

BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

LA GRANDA
OKTOBRO
KAJ ESPERANTO



KION NI HEREDIS
DE ZAMENHOF?



RIGARDO AL
UNIKA ARKIVO



LA INTERNACIA
LINGVO
EN RADIO



NIA INTERVJUO



DENOVE SUR LA
EKFRANO



BRIGADANA
SOMERO '87





La granda Oktobro kaj Esperanto

estis pli ol 400 kongresanoj el 14 landoj. Honora prezidanto kaj protektanto de la kongreso estis A. Luna-čarskij, popola komisaro.

Post unu jaro, en ligo kun la 40-jariĝo de Esperanto, la sovetia poŝto eldonis poŝtmarkon je valoro de 14 kopekoj, kun la portreto de L. L. Zamenhof.

Post la Dua Mondmilito, kiu forrabis la vivon de 20 milionoj da sovetaj civitanoj, la Esperanto-movado iom post iom revigliĝis. Nun denove funkcias organizita Esperanto-movado enkadre de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE). Nun ĉe la kondiĉoj de rekonstruo kaj publikeco Esperanto rikoltos novajn sukcesojn kaj servos pli efike en la batalo por konservo de la paco, por interamikigo.

Jordan KALINOV

ONKLO

Dediĉita al la 70-a datreveno de la Oktobra Revolucio

La Oktobra Revolucio liberigis la rusan Esperanto-movadon el la katenoj de cenzuro kaj policaj persekutoj. En 1918—1919 en Soveta Rusujo ekzistis ne malpli ol 100 esperantistaj societoj kaj grupoj. En 1921 jaro estis fondita Sovet-Respublikara Esperantista Asocio (SREA). En 1925 aŭtoritataj institucioj proklamis la neceson de internacia eduklaboro. Ĝi ne estis efektivebla sen internacia lingvo. Kaj jen siajn servojn proponis la esperantistoj. En multaj lokoj sovetaj gvidantoj subtenis la Esperanto-movadon. Ekz. en Niŝnij Novgorod (nun Gorkij) la aŭtoritato helpis materiale la esperantistojn, por ke ili direktu la internacian korespondadon. En urbo Urĵum lokaj sovetgvidantoj organizis kvarmonatan kurson por instruistoj de Esperanto. Ĉie esperantistoj rekomendis Esperanton kiel facilan lingvon.

En la tridekaj jaroj SREA havis ĉirkaŭ 9 mil organizitajn membrojn kaj 5 pagatajn oficistojn. Regule aperis centra organo kaj pluraj lokaj gazetoj kiel ekz. „Aĝitanto“ eldonata en Kronŝtad. Multaj gazetoj kaj ĵurnaloj havis Esperanto-rubrikojn — „Krasnij Kronŝtad“, „Krasnij Sever“ en Vologda, „Borba“, en Caricin (nun Volgograd), „Soha i molot“ en Mogiljov, „Niŝnegorodskaja komuna“, „Serp i molot“ en Isim, „Trud i hozĵajstvo“ en Ribinsk, „Krasnij Krim“ k. a.

Elkreskis talentaj publicistoj, verkistoj kaj poetoj verkantaj en Esperanto — Dreen, Demidjuk, Devĵatinin, Izgur, Nekrasov, Miĥalski, Muravkin, Hohlov, Spiridoviĉ, Podkaminer, Bokarev, Rublev, Jirkov, Sevĵak, Tkaĉuk, Blinov k. a.

Aperis pli ol 200 libroj, kaj la imponaj revuoj „Nova Epoko“ kaj „Nova Etapo“.

SREA subvenciiis Internacion de Proletaj Esperantistoj kaj eldonejon „Ekrelo“, kie aperis la revolucia poem „Septembro“ de Geo Milev, noveloj „La himno“ de Asen Grigorov kaj „Ĉe abismo“, rakontaro de Hristo Gorov.

Laŭ ekzemplo de sovetaj esperantistoj ekagis proletaj esperantistoj en Germanio, Francio, Britlando, Italujo, Ĉeĥoslovakio, Hungarujo, Svislando. Ankaŭ bulgaraj proletaj esperantistoj ne postrestis. Post la unua mondmilito estis fondita Balkana Liberiga Stelo kaj pli poste Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA), kiu kaŝe disvastigis marksisman-leninisman literaturon („Komunista manifesto“ de Marx kaj Engels, „Ŝtato kaj revolucio“ kaj aliaj verkoj de Lenin). Dank'al Esperanto bulgaraj esperantistoj legis versojn de Majakovskij, rakontojn de Lavrenev, Panĉ, Tank k. a.

Per sia peresperanta agado SEU gajnis la korojn de la proletaj esperantistoj en la mondo. Oni volonte aŭskultis Esperanto-dissendojn el Leningrado kaj Harĵkov. En 1926 en Leningrado okazis la sesa internacia kongreso de laboristoj-esperantistoj. La kongreson ĉe-

Mi havis onklon kaporalon militis li en Suda Fronto kaj kiam tedis la batalo — ribelis li kun sia roto.

Li venis hejmen kun pistolo kaj ruĝa bendo sur la brako. Ĉirkaŭis lin vilaĝ-popolo kaj ekdemandis pri l'monarko.

— Ni detronigos Ferdinandon, ni agos kiel bolŝevistoj! Ni liberigos nian landon kaj parazititoj ne ekzistos!

Kaj kune kun ribelaj trupoj li forveturis al Sofio. Renkontis ilin fajraj kugloj de junkroj — filoj reakciaj.

Ne perdis kredon Miĥaelo, sin sentis ĉiam bolŝevisto — batalis daŭre por libero, evitis ĉiajn kompromisojn.

Kaj kiam marŝis Ruĝarmeo al norda limo de la lando li vokis: „Strikon! Al ribelo sub ruĝa flago“ de l'avangardo!“

Jen tia mia onklo estis — soldato eksa, kaporalo, En klasbatalo li progresis, fariĝis popol-generalo!

H. M. HRIMA



LA RENOVIGO

La XIII Kongreso de Bulgara Komunista Partio, okazinta en 1986 formulis fundamentajn poziciojn pri totala rekonstruo de la lando.

La ĉi-jara plenkunsido de la partio, okazinta la 28-an-29-an de julio, prikonsideris koncepton pri temo „Fundamentaj pozicioj pri plua konstruado de la socialismo en PR Bulgario“, prezentitaj de la ĝenerala sekretario de Centra Komitato Todor Jivkov. En tiu ĉi dokumento oni legas: „La originaleco de la nuntempaj cirkonstancoj postulas ne simple pliperfektigi la ekzistantan modelon (de la socialismo — n. r.), sed transiri al modelo, konforma al la novaj realoj en la mondo, en la socialismaj landoj kaj en PR Bulgario“.

En la plenkunsido oni konstatis, ke la nuna strukturo de la politika sistemo komencis konflikti kun la novaj leĝkonformecoj de la socia evoluo. En la praktiko tio signifas, ke la burokratismo estas forta. Ĝia intertavolo estas relative negranda, sed strebanta konservi sian statuson, kio kaŭzas malprofiton al la socio.

La principo de memregado estas alvokita plej bonmaniere ŝanĝi ĉi staton, por ke la administra aparato servu al la socio kaj al la civitanoj, kaj estu sub ilia kontrolo.

La memregado en nia lando — oni legas en la supra dokumento — postulas revizion de la strukturo de la ŝtatgvidado. Oni antaŭvidas rekonstrui la agadon de la Parlamento, de la Stata Soveto kaj la Soveto de Ministroj. La Parlamento kaj ties deputitoj fariĝos reprezentantoj de la sin memregantaj komunumoj. Oni konsideras, ke ĉe la nunaj kondiĉoj ne estas necesa la funkciado de du apartaj organoj — Stata Soveto kaj Soveto de Ministroj. Oni intencas fondi principe tute novan organon, posedantan samtempe plenumajn kaj dekretajn funkciojn.

Dum la plenkunsido oni pridiskutis la demandon pri fonda de Nacia Asocio de Varproduktantoj, al kiu aliĝos la ekzistantaj asocioj kaj memstaraj mastrumaj unuigoj.

Laŭ la „Fundamentaj pozicioj“ oni jam transformis la eksajn distriktojn en administrajn di-

striktarojn, konsistantajn el pluraj komunumoj.

Oni antaŭvidas ŝanĝon en formado de la organoj de memregado. Interalie plivastiĝos la demokratia bazo ĉe la balotoj, publikeco, pliperfektigo de la konkura sistemo. Esence ŝanĝiĝos la balotsistemo sur ĉiuj gradoj — por unu loko aspiros pluraj kandidatoj.


La rekonstruo celas la bonon de la homo. Speciala atento estas turnata al la socia egaleco kaj justeco. Ĉiu laboristo kaj kamparano devas senti sin mastro de sia entrepreno.

La plenkunsido rekomendis daŭrigi la batalon kontraŭ negativaj fenomenoj — rompantoj de leĝoj kaj disciplino. La negativa ekzemplo de la gvidantoj, la diferenco inter vortoj kaj agoj kaŭzas malprofiton al la socialisma moralo.

Renkonstruo estas farata ankaŭ en la partio. Kiel marksisma-leninisma avangardo ĝi montras la ĝeneralan direkton en la socio, en la soci-ekonomia evoluo de la lando. La gvida rolo de la partio sin esprimas en efektiviĝo de la kadrola politiko, edukado kaj ideologia laboro, en kreado de klimato necesa por realigo de starantaj sociaj celoj.

La plenkunsido unuanime aprobis la koncepton kaj la enkondukan parolon de T. Jivkov kaj decidis proponi al la Nacia Partia Konferenco okazonta en decembro ĉi-jare tezojn pri plua konstruado de la socialismo en PR Bulgario.

La „Fundamentaj pozicioj“ rilatas rekonstruon kaj renovigon ne nur en la ŝtata kaj partia aparato, sed ankaŭ en amasaj kaj kulturaj organizaĵoj, en nia esperantista movado. Estas pridiskutata nova pli celkonforma strukturo de Bulgara Esperantista Asocio, de ĝiaj lokaj estraroj kaj societoj, por ke la instruado kaj disvastigado de Esperanto en nia lando estu pli efika kaj rezultodona, allogu pli grandan nombron da novaj adeptoj al niaj movadaj vicoj. Do, necesas bazaj ŝanĝoj, renovigo en ĉiuj direktoj de nia vivo!



Kion ni heredis de Zamenhof?

*„Prave aŭ malprave la mondo
vidas en mi ĉiam la naturan
reprezentanton de la anaro
esperantista. . .“*

L. L. Zamenhof 1909¹

Kiu kion heredis de Zamenhof? La internacia Esperanto-movado sendube estas komuna heredanto de la de li kreita planlingvo Esperanto. Pri la cetera heredaĵo ekzistas diversaj opinioj. La aŭtoro de la „Tezoj pri la esplorstuloj pri la Zamenhofaj verko kaj vivo kaj ties influo en la Esperanto-movado“, Walter Zelazny entute kontestas la aktualecon de la Zamenhofaj sociaj ideoj por la nuntempo. „Por la nuna, dudeka jarcento Zamenhof por ni lasis la lingvon, dum lian soci-religian penson, almenaŭ nuntempe, oni devas lasi por bibliotekoj kaj arkivoj.“² Tamen liaj tezformaj esplorstuloj koncernas ankaŭ ĉi tiun penson Zamenhofan kaj meritas atenton, kvankam lia pozitivisma starpunkto limigas la aŭtoron. La japana Zamenhof-historiografo Ito Kanzi, internacie konata pro lia eksterordinare ampleksa eldonado de Zamenhofaj kaj prizamenhofaj verkoj, prezentis en sia „senlegenda biografio de L. L. Zamenhof“ reviziitan Zamenhofan homaranismon.³ Li provas per tio utiligi Zamenhofajn pensojn por propagandi propran politikan koncepton. Liajn postulojn pri paco kaj malarmado, lian kondamnon de imperiismaj agoj oni, nature plene konsentas, sed lian proponon ignori sociajn fenomenojn kiel ŝtatoj, lingvoj, nacioj ktp. pro la fatalaj sekvoj oni ne povas konsenti, same aliajn ideojn, ekzemple, la ekskluzivigon de la Zamenhofa heredaĵo: „... sen liaj simpla lingvo kaj naŭva idealo la homaro neniam povos esperi luman estontecon sur tiu ĉi minacoplena terglobo.“ La penojn de Zamenhof por kreo de organizo de la esperantistoj Ito Kanzi interpretas kiel kompromison kun la civilizacio.⁵ Tute alian rilaton al la Zamenhofa idea heredaĵo havas la elstara bulgara partia, sindikata kaj esperantista aktivulo, la honora prezidanto de MEM Nikola Aleksiev. Li interpretas ĉi tiujn Zamenhofajn penojn kiel esprimon de ties demokratismo. La Zamenhofan demokra-

tismon Aleksiev pritaksas „speciale grava.“

La sinteno al la Zamenhofa heredaĵo koncernas gravajn aktualajn problemojn de la homaro, unualoke la porpacan batalon. Hodiaŭ estas necese kaj eble, enkadre de la mobilizado de la tuta homara heredaĵo de pacpensoj en la komuna batalo de tre diversaj fortoj por la sekurigo de la paco, mobilizi ankaŭ la Zamenhofan heredaĵon de pacpensoj. Zamenhof mem respondeplene penis firme ligi sian lingvon Esperanto kun la pacpenso kaj kun la pacmovado. Mi nur memorigas pri liaj kontaktoj kun la organizinto de kelkaj mondpackongresoj Gaston Moch, al kiu li en 1905 skribis: „Nun la pacifistoj ne volas tre ligiĝi kun Esperanto, kaj la Esperantistoj timas ankoraŭ tro oficiale aliĝi al la pacifistoj, sed mi estas konvinkita, ke pli aŭ malpli frue la ideoj de la esperantismo kaj pacifismo kunfandiĝos. . .“⁷ En oktobro de la sama jaro Zamenhof akceptis la titolon de „honora membro de la Internacia Societo Esperantista por la Paco“.⁸ La japana revolucia esperantistino Verda Majo publikigis la 15-an de decembro 1938 alvokon „al la tutmonda Esperantistaro“. 21 jarojn post la morto de Zamenhof ŝi siatempe alvokis al fondo kaj formigo de internacia unuecfonto antifaŝista apogante sin sur la ideoj de Zamenhof. Ankaŭ Verda Majo emfazis la demokratecan idealon de Zamenhof.⁹ Brile ŝi recenzis la Zamenhof-biografiojn de Privat kaj Drezen konstatante la „epokan distancon“ inter ili kaj karakterizante, ke „unuigas en la homo Zamenhof la du ŝajne kontraŭaj flankoj: realismo kaj idealismo. . .“¹⁰ Intertempe pluaj historiografoj el diversaj landoj kundiversaj mondkonceptoj kontribuis al la esplorado kaj prezento de la Zamenhofaj ideoj. Gaston Waringhien ekzemple skizas enkadre de esperantologiaj eseoj evoluon de la Zamenhofaj ideoj kaj konkludas, ke maldikiĝis la religia parto kaj ke „Zamenhof ekkonsciis, ke la vera baro, kiu disigas la homojn nuntempajn, estas malpli la lingvo aŭ la religio, kiel en la pasintaj jaroj“. Li substrekas: „La nacian ŝovinismon li montris tre klare en siaj lastaj verkoj. . . kiel la plej grandan malbonon kaj la plej grandan obstaklon al la paco“. Li kiel ankaŭ aliaj historiografoj montras la humanisman tradicion, en kiun Zamenhof envicigis

sin, sed tamen nur neklare pritaksas lin kiel „grandan apostolon de la homa frateco“. ¹¹ Hodiaŭ marksismaj aŭtoroj pli detale esploras kaj prezentas tiujn realismajn poziciojn, kritike aprezante Zamenhof kiel burĝan humaniston. Canko Murgin ekzemple en la lastaj jaroj surbaze de interesaj fontoj multe kontribuis al realisma Zamenhof-bildo. ¹² Necesas hodiaŭ scienca esploro, kritika aprezo kaj realisma prezento de la Zamenhofa heredaĵo, ĉar ĝi ne nur koncernas la tradiciojn kaj la strategion de la Esperanto-movado, sed ankaŭ influas la imagon de la neesperantista publiko pri nia movado.

Guste nun, kiam la 100-jariĝo de Esperanto instigas pli grandan intereson de la neesperantista publiko al la lingva komunumo de la esperantistoj, pligrandigas ankaŭ la intereso al la personeco, al la vivo, verko kaj mondkonceptoj de ĝia kreinto. Kiu hodiaŭ skribas pri Zamenhof, kiu hodiaŭ pretendas efektiviĝi lian testamenton, unualoke devas konscii pri la spertoj de la historio, devas konscii pri liaj idealoj kaj la eblecoj de ilia efektivigado. Tre grava sperto de la internacia Esperanto-movado estas, ke ĝi nur progresas, ke ĝi situas je la flanko de la fortoj de socia progreso. Nur tiamaniere estas efektivegeblaj la idealoj de Zamenhof. La Unesko-rezolucio rilate al la 100-jariĝo de Esperanto estas aktuala pruvo por tio.

Fritz WOLLENBERG



UEA — PROPONATA POR DU GRAVAJ PREMIOJ

Menciante la centjaran kontribuon de Esperanto al la paco, eminentuloj en multaj landoj proponis Universalan Esperanto-Asociation, kiu estis fondita en 1908, dudekon da jaroj post la kreiĝo de Esperanto, por la Pacpremio Nobel de 1987. La Asocio estas ankaŭ kandidato por la UNESKO-Premio por Edukado kaj Paco. UEA havas konsultajn rilatojn kun UNESKO jam depost 1954 kaj Esperanto dufoje ricevis subtenajn rezoluciojn ĉe la Generala Konferenco de UNESKO — en 1954 kaj 1985.

RENKONTIGO EN LA BRITA PARLAMENTEJO

Festa akcepto estis lastatempe aranĝita por la Parlamenta Esperanto-Grupo en la Cambro de Deputitoj,

Literaturo kaj fontoj

- 1) L. L. Zamenhof: *Originala Verkaro*, Eld. J. Dietterle, Leipzig 1929 (OV)
- 2) Walter Zelazny: *Doktrino de Zamenhof*, en: *Rys-zurd Krasko: Zamenhof, Jerzy Leyk: Movado*, Walter Zelazny: *Doktrino*, Varsovio, PEA, 1983, p. 102.
Walter Zelazny: *Tezoj pri la esplorstudoj pri la Zamenhofaj verko kaj vivo kaj ties influo en la Esperanto-movado*, en: *La Gazeto*, Metz, numero 0 kaj 1, sept. kaj dec. 1985
- 3) Ludovikito (= Ito Kanzi): *Senlegenda biografio de L. L. Zamenhof*, Tokio, 1982
- 4) *Ludovikito*. . . , p. 10
- 5) *Ludovikito*. . . , p. 43
- 6) Nikola Aleksiev: *La demokratismo de Zamenhof*, en: *Paco* 6/1976, p. 11
- 7) *OV*, p. 436
- 8) *OV*, p. 437
- 9) *Verkoj de Verda Majo*. . . , p. 387—394
- 10) *Verkoj de Verda Majo*, Pekino, Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1982, p. 496
- 11) Gaston Waringhien: *1887 kaj la sekvoj, la Laguna* — Rotterdam: *La Stafeto*, 1980, p. 75
- 12) Canko Murgin: *Progresemaĵoj momentoj en la ideologio de L. L. Zamenhof, Kolekto de studoj*, Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1985, p. 15.

honore al la jubilea jaro de Esperanto. Ĝin prezidis parlamentano Roger Gale. Tiel granda nombro da homoj partoprenis, ke oni devis malfermi duan akceptejon. Post malferma parolado de s-ro Gale, parolis s-ino Mary Austin, prezidanto de la Esperanto-Asocio de Britujo, kiu priskribis lastatempajn evoluojn, inkluzive la akceptigon de Esperanto kiel oficiala temo de la Generala Diploma de Meza Edukado.

La Parlamenta Esperanto-Grupo estas nun la plej granda grupiĝo ĉe la Parlamento. Membras 204 parlamentanoj, inter ili ministroj Robin Squire, Ken Wetch kaj Geraint Howells. Kvankam nur dekkvino da parlamentanoj iom scipovas Esperanton, multaj aliaj subtenas la bezonon de internacia lingvo, kiu, laŭ ili, helpus fortigi la ligojn inter la nacioj de la mondo.

(El „Novjorka novaĵletero“, junio 1987)

LA AKTIVECO DE BULGARAJ MEDICINISTOJ

La malnova urbo Krakovo estis dommastro de la VI Internacia Medicina Esperanto-Konferenco (IMEK), kiu okazis de la 20-a ĝis la 24-a de julio k. j. Ĝin partoprenis 145 delegitoj el 17 landoj — Sovetunio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, GDR, FRG, Bulgario, Jugoslavio, Ĉinio, Belgio, Nederlando, Finnlando, Svedio, Aŭstralio, Usono, Kolumbio, Japanio kaj Pollando. Inter la partoprenantoj estis elstaraj scienculoj, lokaj sociantoj.

La bulgara grupo konsistis el 10 medicinistoj ĉe kape kun la prezidanto de la Medicina Esperanto-Sekcio ĉe BEA prof. d-ro Kiril Popov.

Al la medicinistaj gastoj de Krakovo estis proponitaj bonegaj kondiĉoj en la studentaj amasloĝejoj. La sciencaj kunsidoj, afercaj renkontiĝoj kaj ekspozicioj okazadis en la moderna konstruaĵo de la nova infankomplekso de Krakova Medicina Akademio.

Dum la konferenco oni pridiskutis 31 scienc-prelegojn. Bulgaraj partoprenantoj prelegis pri la kario (Lukanova), pri febra katatonia (Ignev-Denizova), pri eksperimentaj enzimaĵoj esploroj (Ĉolakova), kaj pri la humanisma kontribuo de niaj medicinistoj-esperantistoj dum la 100-jara historio de Esperanto. Novaĵoj el la medicina praktikado estis prezentitaj en la ekspozicio de nuntempaj pola aparataro kaj kuracrimedoj. Ĉina kolorfilmo montris la aplikadon de akupunkturo ĉe anestezo kaj operacioj.

La rektoro de la Medicina Akademio en Krakovo prof. D-ro Marek Sych enmanigis jubileajn medalojn kaj atestilojn al elstaraj medicinistoj — aktivuloj de la monda Esperanto-movado. Prof. D-ro K. Popov estis honorita per la jubilea medalo de la Medicina Akademio „500 jaroj de la naskiĝo de Nikolao Koperniko“ lige kun lia kontribuo al la disvastigo kaj uzo de la Internacia Lingvo por medicinaj celoj kaj kontaktoj.

La partoprenantoj de la VI IMEK vizitis la mondfaman Krakovan historian farmaciaĵan muzeon, kies riĉa ekspozicio enhavas pli ol 2 milionojn da objektoj, montrantaj la evoluon de la farmacio en Pollando ekde la antikveco ĝis nun. Krome, ili vizitis la reĝan kastelon „Wawel“, simbolo de la pola potenco dum la mezepoko. En la subteraj galerioj de la unika salminejo Wieliczka la vizitantoj-esperantistoj vidis skulptaĵojn majstre faritajn el salo. La kongresanoj metis florojn antaŭ la monumentoj de la viktimoj de la Dua Mondmilito kaj de la viktimoj de la germana faŝisma infero — la koncentrejo de la morto en Oświęcim!

En Varsovio la bulgaraj medicinistoj aliĝis al la multnombraj gekongresanoj el Bulgario kaj partoprenis la 72-an UK. Dum la kongreso okazis jarkunveno de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA). Ĝia prezidanto D-ro I. Ferenczy faris raporton kaj tre alte pritaksis la ĵus finiĝintan VI IMEK en Krakovo. D-ro S. Jamazoe raportis pri la financaj aferoj kaj prof. K. Popov informis pri la rilatoj kun tutmondaj neesperantistaj medicinistaj organizaĵoj. Oni emfazis la kontribuon kaj la pozitivan rolon de la eldonitaj „Medicina Internacia Revuo“ (eldonata en Japanio) kaj „Medicina Kuriero“ (Bulgario). En la nova estraro de UMEA estas elektitaj: prezidanto — Imre Ferenczy (Hungario), vicprezidanto — Kiril Popov (Bulgario), ĝenerala sekretario — Saburo Jamazoe (Japanio), sekretario — Wl. Opoka (Pollando). Unuanime oni akceptis la proponon, ke la sekvonta IMEK okazu en 1989 en Belgio.

Dum la jubilea kongreso en Varsovio la bulgaraj medicinistoj partoprenis ankaŭ la kunvenojn de MEM kaj de aliaj internaciaj E-organizaĵoj.

D-rino Ljudmila KOSTOVA

FORUMO DE BLINDULOJ

De la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1987 en Varsovio okazis la 55-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE), kies temo estis „Esperanto en servo de la paco kaj rekaptado de nevidantoj“. Partoprenis 302 nevidantoj el 23 landoj, kune kun siaj gvidantoj. Plej multnombraj estis la grupoj el Bulgario, Italio, Pollando, Sovetunio. Estis reprezentantoj ankaŭ el malproksimaj Hindio, Usono, Kanado.

En la kongresa programo estis traigitaj 8 referaĵoj, inter kiuj „Institucioj kaj organoj por blinduloj en Pollando“ (Kazimir Limonček — prezidanto de Pola Asocio de Nevidantoj), „100 jarojn E-kulturo“ (prof. Tomislav Karlović — Jugoslavio), „Esperanto inter antaŭjuĝoj kaj miskomprenoj“ (d-ro Jan Kes, teologovidanto — Pollando), „Signifo de radioelsendo en la E-movado“ (Andzej Pettyn — Radio Polonia). Okazis du kunvenoj de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE). Estis analizita la multflanka agado de LIBE kaj anoncitis la rezultoj de la lasta balotado por novaj membroj de LIBE-estraro. Nun prezidanto estas prof. Tomislav Karlović kaj ĉefsekretario Atila Vare (Hungario).

La kongreso estis vizitita kaj salutita de d-ro Humfrey Tonkin — prezidanto de UEA. La kongresanoj metis florojn sur la tombon de d-ro Zamenhof.

Interesa estis ankaŭ la amuza kongresprogramo: pola folkloro vespero, internacia vespero, en kiu partoprenis ankaŭ bulgaroj, kvizoj, ekskursoj. En la programo per koncerto partoprenis la bulgara koruso ĉe legejo „Louis Braille“ el Sofio.

Multaj gekongresanoj kontribuis al la fonduso „Bjalistok“.

La kongreso akceptis tri rezoluciojn: rilate al multflanka agado de LIBE kaj por helpo de nevidantaj esperantistoj en evoluantaj landoj; al Monda Asocio de Blinduloj — por akcepti Esperanton kiel laboran lingvon egale kun aliaj lingvoj dum siaj internaciaj aranĝoj; al naciaj registaroj — por akcepti fakultativan instruadon de Esperanto en la lernejoj por nevidantoj. Sekvonta IKBE okazos en Nederlando en 1988.

Vladimir JELEV

MUZIKISTOJ SOJLE DE SIA JUBILEO

Venontjare Muzika Esperanto-Ligo (MEL) celebras sian 25-jariĝon. Kun la konstanta kresko de la Esperanto-movado aperis bezono kunligi kaj helpi muzikistojn kaj muzikamantojn pere de la Internacia Lingvo. Tiun taskon efektivigas Muzika Esperanto-Ligo.

Enkadre de la 72-a Jubilea UK en Varsovio okazis la ĝenerala jarkunveno de MEL. La 28-an de julio 1987 en salono „Privat“ ĉirkaŭ 110 esperantistoj-muzikistoj kaj muzikamantoj el 23 landoj ĉeestis la kunvenon. Post la malfermo kaj unuminuta omaĝo al la memoro de la forpasinta MEL-ano, la mondfama bulgara E-kantisto Veselin Damjanov, la prezidanto de MEL Dimitar Terziev (Bulgario) raportis pri la agado de MEL. Koncize kaj klare li parolis pri la historio de la 100-jara muzika agado de esperantistoj kaj pri MEL, pri la bulteno de MEL „Muziko“, kiu nun per artikoloj kaj anoncoj informadas la MEL-anojn pri la taskoj lige kun la antaŭstaranta 25-jara jubileo de MEL en 1988.

La sekretario de MEL, Niklaus Weiss (Svislando), koncize raportis pri la malfacilaĵoj ĉe eldonado de la bulteno „Muziko“. Lige kun tio okazis diskutoj.

La kunveno elektis novajn estraranojn: Johano Laska (Pollando) kaj Pedro Vilarroig (Hispanio), nomis „Dumviva honora sekretario“ de MEL s-ro David Hill (Britio) — ekssekretario de MEL, akceptis aliĝpetojn de 26 esperantistoj-muzikistoj kaj muzikamantoj.

Honoro por la partoprenantoj estis la ĉeesto de la eksprezidanto kaj nuna „Dumviva honora prezidanto“ de MEL, prof. d-ro Stojan Ĉugev. En sia parolado li esprimis sian ĝojon pro la bona kaj aktiva laboro de MEL kaj sian konvinkon, ke MEL povas esti ilo, helpanta la muzikistojn kaj muzikamantojn kontribui per la internacia lingvo Esperanto por kultura interŝanĝo kaj paco en la mondo.

Muzikistoj kaj muzikamantoj el Bulgario, kiuj deziras esti MEL-anoj kaj ricevi la bultenon „Muziko“, devas sendi la jarkotizon — 5 lv., (por pensiuloj — 3 lv) al la adreso de BEA, p.k.66, BG-1000 Sofio (por MEL).

Liljana DOKOVA

Bonega amiko de nova Bulgario

William Gilbert — 75-jara

La nomo de la franca esperantisto William Gilbert estas konata al multaj bulgaraj esperantistoj el la meza kaj pli nova generacioj. Li estis kelkfoje gasto al nia lando, partoprenis internaciajn kaj landajn kongresojn, parolis antaŭ bulgara kaj esperantista publiko. Mi citos nur kelkajn faktojn. En 1968 li venis al Bulgario por ĉeesti la internacian konferencon organizitan de MEM, kontraŭ la komenciĝinta la antaŭan jaron israela agreso kontraŭ Egipto (daŭranta be-daŭrinde jam du jardekojn kontraŭ aliaj arabaj popoloj, nome la palestina kaj libana). Post la konferenco li kaj la ceteraj partoprenintoj faris ekskurson tra Bulgario, konatigis kun ties historiaj, geografiaj kaj kulturaj rimarkindaĵoj, parolis kun multaj bulgaraj esperantistoj en la vizititaj lokoj. Ĉio ĉi faris el li ardan amikon de nova Bulgario kaj li deklaris, ke Bulgaron li sentas kiel sian duan patrolandon.

En Targovište li parolis antaŭ granda mitingo de la urba loĝantaro, organizita far la Distrikta Pacdefenda Komitato kaj la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto, helpate de la urba Esperanto-societo. Partoprenis kiel oratoroj ankaŭ kelkaj aliaj esperantistoj el eŭropaj kaj aziaj landoj. La internacia mitingo havis grandegan sukceson.

En 1980, dum la tagoj de monda kongreso de pacadeptoj nomita „Par-

lamento de la popoloj“, Gilbert kaj aliaj delegitoj de tiu pacforumo aperis antaŭ kunveno de la sofia esperantistaro kaj parolis pri la celoj de „Parlamento de la popoloj“. Li partoprenis tiun pacforumon en sia kvalito de Ĝenerala Sekretario de MEM en la konsisto de kvarmembra delegitaro frunte kun la prezidanto de MEM d-ro Imre Pethes.

Private Gilbert vizitis kelkfoje Bulgaron kun sia edzino por ferii sur la bordo de la Nigra Maro, en la ripozejo „Slânčiv brjag“ (Suna Bordo). Feriante en Varna, mi vizitis la familian paron Gilbert en „Slânčev brjag“ kaj havis kelkhoran agrablan amikan konversacion.

Gilbert faris multon por propagandi Bulgaron kiel turistan landon kaj kontribuis al ĉiujara vizitado de bulgaraj marstrandoj far francaj turistoj.

Nuntempe li estas vicprezidanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj daŭre plenumas siajn funkciojn de elstara kaj aktiva pacbatalanto kiel en la medioj de monda esperantistaro, tiel same en la vicoj de franca kaj tutmonda movado de pacadeptoj, estante membro de la Monda Packonsilio.

Tiujn ĉi liniojn mi skribas okaze de grava evento en la persona vivo kaj socia agado de nia amiko Gilbert: li fariĝis 75-jaraĝa. Komence li praktikis kelkajn aliajn internaciajn lingvojn, sed poste firme ekstaris sur la pozicioj de Esperan-

to. Li publikigis du verkojn pruvantaj la bonegajn kvalitojn de Esperanto: „Planlingvaj problemoj“ (kun subtitolo: „Esperanto kaj la naturalismo“) kaj la aktuala broŝuro „Landaj nomoj en Esperanto“. La unua lia verko aperis eĉ en dua eldono (1977).

Pacamiko Gilbert publikigis dekojn (se ne pli) da artikoloj en la organo de Franca Laborista Federacio „La esperantista laboristo“, en diversaj francaj gazetoj, en la esperantista gazetaro kaj en apartaj libro-kolektoj. Per sia plumo li arde defendas la noblajn pacaspirojn de la monda esperantistaro kaj de la vasta internacia movado de pacadeptoj al mondo sen armiloj, al mondo sen militoj, al serena ĉielo super la tuta homaro. Li bonege posedas la Internacian Lingvon kaj trafe, argumentite defendas la interesojn de la popoloj pri paco, kunlaboro, interkompreniĝo, utiligante por tiuj celoj ankaŭ la internacian lingvon Esperanto. Ne hazarde li estas unu el la fondintoj de MEM en 1953 kaj pli ol tri jardekojn laboras kiel elstara aktivulo de MEM, ĉu kiel ties ĝenerala sekretario, ĉu kiel ĉefredaktoro de la MEM-organo revuo „Paco“.

Ni bondeziru al William Gilbert sanon kaj daŭran fruktdonan pacagadon.

Nikola ALEKSIEV

Li estas unu el unuaj esperantistoj en urbo Jambol. Naskita la 29-an de novembro 1880, apenaŭ 9-jaraĝa Penko Petrov Penkov komencas okupiĝi pri Esperanto. Pri la Internacia Lingvo li informiĝas per artikolo de Georgi Oreškov publikigita en revuo „Jivot“ (Vivo) en 1889. La juna Penko kontaktas Georgon Oreškov, havigas al si lernolibron kaj komencas lerni Esperanton.

Tom post iom komenciĝas lia korespondado kun bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj. Per bildkarto, sendita al la juna esperantisto en 1900, Georgi Oreškov informas lin pri sia laboro por aperigo de Esperanto-lernolibro. Korespondanto de Penko estas ankaŭ la usonano Geo Geagan, laŭ kies propono la esperantista stelo estas verda.

En la arkivo de Penko Penkov, konservita ĝis nun de lia jam 79-jara filo Petăr Penkov — ankaŭ bona esperantisto, estas unikaj leteroj kaj poŝtkartoj — plejparte senditaj el internaciaj kongresoj, lernolibroj, vortaroj, revuoj, belarta literaturo — ĉirkaŭ 300 volumojn. Inter la valoraj dokumentoj estas ankaŭ foto de la partoprenintoj en la Universala Kongreso en Krakovo 1912.

Penko Penkov korespondis ankaŭ kun la aŭtoro de la Internacia Lingvo. En la registro de d-ro Zamenhof li estas korespondanto numero 4774. La jambola



esperantisto sciigas la kreinton de Esperanto pri la evoluo de la E-movado en Bulgario kaj prezentas al li novajn adeptojn de la lingvo en nia lando.

Librovendisto laŭ profesio, Penko Penkov uzas Esperanton en sia komerca agado — por ricevo de papervaroj el Germanio. Laŭ konvinko li estas socialdemokrato kaj lia librovendejo en urbo Jambol, nomita „Iskra“ (Fajrero), fariĝas centro de la urbaj socialdemokratoj.

En la riĉa arkivo de P. Penkov provokas intereson unu letero de la 1-a de novembro 1905 sendita al li de lia korespondantino Anna Selenberg el Voronej. Si komunikas al li pri la fervojista striko en la urbo kaj pri polica krueleco. Alifoje sur unu poŝtkarto ŝi rakontas pri atenco kontraŭ la voroneja guberniestro. Penko Penkov tradukas en bulgaran lingvon citaĵojn el la leteroj kaj sendas ilin al la redakcio de „Rabotničeski vestnik“ (Laborista Gazeto), kiu aperigas ilin en numero 23/1905 en la rubriko „El eksterlando“. Tio estas eble unua el la informoj pri la rusa revolucio en 1905. Kopio de la letero, skribita sur 8 paĝoj, estas transdonita en 1968 al la Muzeo de la Revolucio en Moskvo.

P. Penkov kolektas ankaŭ poŝtmarkojn. Dum la Universala Kongreso en Varna — 1978 li organizas ekspozicion el poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj por la periodo 1900—1905.

Ĝis la fino de sia vivo (li forpasis en 1978), Penko Penkov estas lektoro de Esperanto en la Pedagogia Lernejo en Jambol, gvidas ankaŭ urbajn E-kursojn. Li estas distingita per la Ora Insigno de Bulgara Esperantista Asocio.

Iljana ILIEVA

INTERNACIA LIBROEKSPOZICIO

SURPRIZA INTERESO AL NIA ELDONAGADO

La renkonto kun la libroj ĉiam estas emocia kaj ĝuoplena. Ili konservas la saĝecon de la jarcentoj, la maltrankvilan kaj ĉiam serĉantan penson de la homaro. La libroj unuigas la homojn el la diversaj partoj de la mondo kaj helpas ilian amikan kaj pacan kunkuzistadon.

Impona manifesto de la grandega rolo de la libroj en nia nuntempa mondo estis la ĉi-jara Internacia Lib-

roekspozicio, kiu okazis de la 8-a ĝis la 14-a de septembro en Moskvo. En tiu ĉi granda forumo partoprenis pli ol 3000 eldonejoj kaj librofirmaoj el diversaj partoj de la mondo. En la vastaj kaj helaj ekspoziciaj haloj oni povis vidi librojn eĉ el la plej etaj kaj plej ekzotikaj landoj.

La impona ekspozicio donis indan lokon al la Esperanto-libroj, eldonitaj en diversaj landoj. Tie oni povis vidi plurajn Esperanto-librojn sur la standoj de Vjetnamio, GDR, USSR (Estonio), Hungario, Ĉinio ktp. Tamen la plej multaj kaj inter la plej allogaj estis la Esperanto-libroj, prezentitaj en la stando de Bulgario. Eĉ la organizantoj de la bulgara libroekspozicio ne supozis, ke estos tiel granda intereso al la Esperanto-libroj, eldonitaj en nia lando.

Preter la bulgara Esperanta stando trapasis ĉirkaŭ dekmil sovetaĵ civitanoj kaj inter ili multe da esperantistoj, kiuj per eksterordinara intereso trafolumis la bulgarajn Esperanto-librojn, petis informojn pri la Esperanta libroeldonado, pri la eldonado de E-gramofondiskoj, pri la progreso de la esperantista movado en Bulgario.

Dank' al tiu ĉi eksterordinara intereso la Sovetia Internacia Librokomerca Entrepreno „Mejkniga“ ligis kontrakton kun Bulgara Internacia Librokomerca Entrepreno „Hemus“ pri importado de libroj, eldonitaj en Bulgario. La kontrakto antaŭvidas pligrandigon de la importado de bulgaraj Esperantaj libroj kaj gramofondiskoj.

La oficialaj reprezentantoj de Bulgara Esperantista Asocio Slavčo Davidov kaj Georgi Mihalkov havis plurajn renkontiĝojn kun eldonistoj kaj ĉefoj de diversaj sovetaĵ librokomercaj entreprenoj, kun kiuj ili preparolis la detalojn pri la eksporto de Esperanto-libroj al Sovetunio.

La 15-an de septembro 1987 S. Davidov kaj G. Mihalkov havis oficialan renkontiĝon kun Lidija Sa-

nina — respondeca sekretario de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, kaj kun Dmitrij Perevalov — prezidanto de Sovetunia MEM-komitato. Dum la amika kaj sincera renkontiĝo estis preparolitaj gravaj problemoj pri la librointersaĝo kaj pri la kultura kunlaborado inter la Esperanto-asocio de la du frataj landoj. La bulgara delegacio donacis plurajn Esperanto-librojn, gramofondiskojn, revuojn kaj portretojn de Zamenhof al la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj.

La moskvaj esperantistoj gastame bonvenigis nian Esperanto-verkiston Georgi Mihalkov, kies originalaj Esperanto-verkoj estas konataj en Sovetunio. Unu el la Esperanto-klubo en Moskvo organizis literaturan vesperon, dum kiu Georgi Mihalkov rakontis pri Bulgario, pri la Esperanto-movado en nia lando kaj pri la E-libroeldonado de BEA.

La Internacia Libroekspozicio en Moskvo, kies slogano estis „La libro en servo al paco kaj progreso“, elokvente montris ne nur la grandegan deziron de la homoj vivi en paco kaj amikeco, sed montris ankaŭ la gravan rolon de la Esperanto-libro en la kontribuo al la mondpaco kaj frateco.

G. ILIEV

Abonu tuj!

KARAJ LEGANTOJ,

ABONU TUJ REVUON „BULGARA ESPERANTISTO“ — monatan organon de Bulgara Esperantista Asocio

- „BULGARA ESPERANTISTO“ estas unu el la plej malnovaj E-revuoj en la mondo — fondita en 1919
- „BULGARA ESPERANTISTO“ traktas aktualajn problemojn de la E-movado en Bulgario kaj en aliaj landoj
- „BULGARA ESPERANTISTO“ estas libera tribuno de la legantoj
- „BULGARA ESPERANTISTO“ disponigas al vi interesajn originale verkitaĵojn en Esperanto aŭ tradukitaĵojn literaturajn verkojn de bulgaraj kaj fremdaj aŭtoroj.

Jarabono: por Bulgario — 2.90 lv.

por socialismaj landoj — 5.42 lv.

por ĉiuj ceteraj landoj — 5.90 lv.

(aŭ egalvaloro en nacia valuto)

ABONU PERE DE REP (Entrepreno por Disvastigo de la Gazetaro)

LASTA LIMDATO — 30-a de novembro 1987.

ATENTU! LA ELDONKVANTO ESTAS LIMIGITA!

ABONU LA REVUON ANKAŬ POR VIAJ EKSTERLANDAJ AMIKOJ!

ALILANDAJ LEGANTOJ POVAS ABONI ĈE LA CENTRA OFICEJO DE UEA EN ROTTERDAM — Nieuwe Binnenweg 176, 3013 — BJ Rotterdam, Nederlando.

LA REDAKCIO



VARNO

DENOVE POST DUONJARCENTO

Antaŭ duonjarcento iu el la gvidantoj de la aŭstria Esperanto-movado, Hugo Steiner, skribas ke li diligente legas revuon „Bulgara Esperantisto“ kaj regule aŭskultas la Esperanto-elsendojn de Radio Varna. Iom pli malfrue li konfesas, ke pro la malpemeso de Esperanto post la „alligo“ de Aŭstrio al la Tria „Reich“, li ne havis alian eblecon krom senti sin membro de la bulgara esperantista movado. Versajne meriton pri tio havas ankaŭ la poetoj-esperantistoj el Varna Dimitar Zlatarski — Miti, kaj Violin Oljanov — Zefiro, kiuj regule korespondis kun la aŭstria esperantisto.

50 jarojn post la unuaj elsendoj en la Lingvo Internacia Radio Varna denove komencis elsendi en Esperanto — dum sia speciala programo por la eksterlandaj turistoj kaj somerumantoj. Paralele kun la emisioj en bulgara, rusa, angla, franca, germana, pola kaj ĉeĥa lingvoj dimanĉe de la 14.15 h. ĝis la 14.30 h. ĉiun duan semajnon oni elsendas ankaŭ en Esperanto. Momente tio estas nur 5—6 elsendoj jare, sed kun la espero pri pliigo de ilia nombro kaj tempodaŭro en proksima estonteco. Jam estas elsenditaj sur mezaj ondoj (388 m) ok elsendoj kun ĝenerala tempodaŭro de pli ol 120 minutoj. Tio estigis ebla dank' al la iniciato de DE de BEA — Varna, de la Komitato pri Televizio kaj Radio — Sofio, de la estraro de la distrikta TV-centro en Varna kaj de speciale preparita Esperanta radio-skipo.

La unua el la elsendoj estis dediĉita al la preparo por aliĝo de la bulgaraj esperantistoj al 72-a UK, al la celebrego de la 100-jara datreveno de la Lingvo Internacia en la Nacia Kulturpalaco „Ljudmila Jivkova“ en Sofio kaj al la E-solenaĵoj en Varna — MARE'87. La elsendon je la 13-a de junio j. k. partoprenis la tiama prezidanto de BEA Hristo Gorov kaj prof. Stojan Guĝev.

La duan elsendon okazis la 26-an de julio 1987. Ĝi estis dediĉita al la bulgara partopreno en la ĉi-jaraj kongresoj en Varsovio kaj Krakovo kaj al la filmo pri la jubileo de Esperanto. La elsendon partoprenis la ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“ — Donĉo Hitrov, la prezidanto de Bulgara Esperantista Junularo — Cvetka Miteva k. a. Estis menciita ankaŭ la speciala paĝo de gazeto „Borba“ — Veliko Tŕrnovo, dediĉita al Esperanto.

En la tria elsendo, la 9-an de aŭgusto, eksterlandaj esperantistoj parolis pri la bulgara partopreno en la 72-a UK kaj pri la internacia esperantista laborbrigado, organizita en la regiono de urbo Burgas kaj esprimis siajn impresojn pri nia lando. Estis ankaŭ opinioj de aŭskultantoj pri la elsendoj de Radio Varna en Esperanto.

La kvara kaj la kvina elsendoj okazis la 23-an de aŭgusto kaj la 6-an de septembro. En la programoj partoprenis gastoj el USSR, Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Francio k. a.

En la tago de la 100-a datreveno de Esperanto — la 26-an de julio, estis elsenditaj 2-minutaj informoj pri la Internacia Lingvo ankaŭ en la emisioj en rusa, angla, franca, germana, pola kaj ĉeĥa lingvoj.

Ilja PANAJOTOV,
redaktoro de la E-elsendoj
de Radio Varna

VIENO

ELSENDAS CIUDIMANCE

„Parolas Radio Vieno.“ — ĉiun dimanĉon sur mallongaj ondoj komenciĝas la 15-minuta E-elsendo de tiu radiostacio.

Radio Vieno estis inter la unuaj radiostacioj, kiuj komencis disaŭdigi E-programojn jam en 1924. Tiam okaze de la Universala Kongreso de Esperanto kelkaj eminentuloj parolis prove antaŭ la mikrofono de la tiam ankoraŭ nur provizora radiostacio. Regulaj E-disaŭdigoj komenciĝis sekvontjare. La elsendotempo estis tiam, samkiel ĉi-momente, proksimume kvaron-horo semajne. Kutima parolisto estis Walter Smital, konata viena esperantisto. Oni elsendis E-kursojn, komunikis novaĵojn kaj informojn. Inter la aŭtoroj de materialoj estis tiam elstaraj personecoj el la politika vivo de Aŭstrio.

Post la anekso de Aŭstrio en 1938 oni ĉesigis la E-elsendojn de Radio Vieno por ok jaroj. Nur en 1947 oni sukcesis restarigi la regulajn E-programojn dank' al la klopodoj de Hugo Steiner, fondinto de la Internacia E-Muzeo en Vieno. Parolisto ekde tiam estas Emil Vokal, kiu ĉi-jare festas sian 40-jaran jubileon en tiu funkcio. Gustav Loibl redaktis la elsendotajn tekstojn ĝis la komenco de la 70-aj jaroj. Ekde 1973 redaktoro estas d-ro Karl Beckmann, de la novarangitaj E-disaŭdigoj de la Poreksterlanda Servo sur Mallongaj Ondoj, nun Aŭstria Radio Internacia. Tiam, en 1973, laŭ instigo de la federacia kanceliero d-ro Bruno Kreisky kaj sub ties protekto oni komencis elsendi E-programojn por Aŭstrio kaj eksterlando sur mallongaj ondoj, kiuj plu daŭras. Ili trovas vastan eĥon tutmonde — ĉiusemajne estas ricevataj ĉirkaŭ 50 poŝtaĵoj, inkluzive E-periodaĵojn kaj aliajn presaĵojn. Tio estas tre grava, ĉar de la leteroj dependas la pluekzisto de la E-elsendo de Radio Vieno.

Nuntempe ĉiu elsendo de Radio Vieno daŭras 15 minutojn kaj konsistas el tri rubrikoj: „Semajna Komentario“ (proksimume 3 min.), „Feliĉetono“ (7 min.) kaj „El nia leterkesto“ (5 min.).

La „Semajna Komentario“ el oficiala vidpunkto estas la plej grava ero. Ĝin verkas en germana lingvo preskaŭ ĉiam la ĉefo de la Poreksterlanda Servo de Radio Vieno (nun prof. Paul Lendvai). La esperantlingvan version de la „Semajna Komentario“ preparas d-ro Karl Beckmann, koncizigante ĝin, kun adapto al la intereso de nia E-publiko.

La „Feliĉetono“ konsistas el temoj koncernantaj Aŭstrion — lando, pejzaĝoj, homoj, vivo kaj kulturo, kaj el temoj, kiuj el aŭstria vidpunkto koncernas eksterlandon. Oni povas prezenti ekz. vojaĝimpresojn spertitajn de fremdlanda turisto en Aŭstrio aŭ recenzojn preparitan de redakciano pri E-libro aperinta eksterlande.

En la rubriko „El nia leterkesto“ oni unue listigas ĉiujn poŝtaĵojn, ricevitaĵojn dum la pasinta semajno — leteroj, periodaĵoj kaj aliaj presaĵoj. Tiamaniere oni konfirmas la ricevon. Perletere la E-redakcio respondas nur al seriozaj demandoj. Post la prezento de la listo de ricevitaĵoj oni uzas la restintan tempon por citaĵoj. Estas citataj karakterizaj laŭ redakcia opinio ĝenerale interesaj lokoj el leteroj — aproboj, malaproboj aŭ aliaj opiniesprimoj pri lingvaĵo, stilo kaj prezentmaniero de disaŭdigitaj temoj.

Evgeni GEORGIEV

„Mi ribela Liberon deziras“

Eŭgeno Miĥalski
(1897—1937)

Post la Unua Mondmilito komenciĝas nova promesplena periodo por la originala Esperanto-poezio. La Granda Oktobra Socialisma Revolucio inaŭguras la epokon de la nova libera vivo kaj donas fortan puŝon al la arto kaj literaturo. Tio influas ankaŭ la originalan Esperanto-poezion kaj en Sovetunio formiĝas sovetita literatura skolo, kies plej talentaj reprezentantoj estas Nikolaj Nekrasov, Nikolaj Hoĥlov kaj Eŭgeno Miĥalski. Per siaj poemoj ili ĉiuj renovigas la poezian verkadon en Esperanto, sed inter ili sendube elstaras la lasta.

Ne estus troigo se ni dirus, ke Eŭgeno Miĥalski alportis la revolucion impeton en nian poezion. Tiu ĉi fajra inspira poeto naskiĝis la 21-an de januaro 1897 en Letiĉev, Ukrainio. Jam en 1911, nur dekkvarjara li konatiĝas kun Esperanto kaj fervore eklaboras por la ideo de la Lingvo Internacia. En 1917 la dudekjara Miĥalski fondas en urbo Saratov la literaturan Esperanto-revuon „Libera Torento“, en kiu aperigas siajn unuajn originalajn kaj tradukajn poemojn. La juna instruisto kaj bibliotekisto entute dediĉas sian talenton al la originala Esperanto-poezio kaj entreprenas abundan verkadon. Liaj poemoj aperas en la SAT-organoj, kiel „Bulteno de SEU“, „Internaciisto“ kaj „La Nova Etapo“.

En 1918 aperis lia unua poemaro „La unua ondo“, sekvis la poemkolektoj „Du poemoj“ (1922), „Prologo“ (1929), „Fajro kuracas“ (1932), „Kantoj de l'amo kaj sopiro“ (1934). Bedaŭrinde, pluraj gravaj liaj manuskriptoj perdiĝis. Restis nur fragmentoj de la poemo „Reforĝo de l'Homo“, kiu enhavis 5000 versojn kaj estis verkita inter 1934-1935.

Miĥalski ne nur aktive verkis, sed ankaŭ aktive partoprenis en la Esperanta literatura vivo. En la tridekaj jaroj li estis organiza sekretario de la Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj.

Lia talento vekis la atenton jam de liaj samtempuloj kaj en 1929 Nikolaj Nekrasov verkas artikolon pri la poezio de Miĥalski en la revuo „La Nova Epoko“ sub titolo „Artistoj de Versoj“. William Auld same verkis plurajn artikolojn pri Miĥalski, konfesante, ke Miĥalski estas lia instruisto en la Esperanto-poezio.

La talento de Miĥalski ne estas nur en lia lingva sentemo kaj inventemo. Li sukcesis per sia elokventa, fleksebla poezia lingvo esprimi la plej grandajn ideojn kaj problemojn de sia nuntempo kaj paralele li profunde rigardis en sin mem, analizis siajn pensojn kaj sentojn, atente esploris kiel la sociaj ŝanĝoj influas liajn pensmanieron kaj mondkoncepton.

„Mi kun koro ribela deziras,
deziras, sopiras Liberon,
Liberon, purigan aeron,
aeron. . . Premite mi spiras. . .
Mi ribela Liberon deziras.“

(El la ciklo „Frenezo“)

Miĥalski postlasis plurajn poemojn, kiuj atestas pri la temabundo de lia poezia kreado. Li prikantis la novan vivon, la novan homon, kiu ribelas kontraŭ la malnovaj moroj kaj antaŭjuĝoj kaj kiu sopiras liberan, feliĉan vivon. Li prikantis la amon, la plej benitan homan senton kaj, kompreneble, dediĉis belegajn poemojn al Esperanto.

Ĉi-jare ni festas 90 jarojn de la naskiĝo de Eŭgeno Miĥalski kaj 50 jarojn de lia forpaso. La Esperanto-poezio de Miĥalski neniam forvelkos, liaj poemoj, kiuj estos ĉiam legataj, inspiros la venontajn Esperanto-poetojn kaj legantojn.

Georgi MIRALKOV

JAM SUPERFLUAS VORTOJ

Jam superfluas vortoj, — transiru ni al agoj, posedu kuragecon, obstinon, paciencon. Sufiĉas jam revado kaj belaj dolĉimagoj — ni devas esti bravaj kaj havi volpotencon.

Ni forĝu novan vivon sur firma nov-amboso kaj ŝprucu ni fajregojn en la aer' mucida, — ĉar vera viv' naskiĝi nur povas el ĥaoso, alie ni pereos pro nia stat' rigida. . .

Miljaroj jam forpasis en paca evoluo — kaj kion do ni havas en fina rezultato? — Malĉasto ĝenerala, fiagoj, sangofluro, kaj nia tuta vivo nur estas kazemato!

„Ŝtupar' de Evoluo“ — ne estas nia savo, ĉar ĝian lastan ŝtupon ĉu iam oni venas?! Dum pac-evoluante ni restas nuraj sklavoj, la Vivo, suĉa Monstro, triumfas kaj katenas.

Ni devas nin pretigi al la operacio kaj per sentema mano distranci la abceson por tutforigi puson el korpo de l'socio kaj de malsan' terura ĉesigi la progreson.

Ni rekomencu vivon sur ŝtonoj de ruino. Ni templojn rekonstruos neniam pro tialo, ke ili nur limigas flugcelon al Senfino, kreante rigidaĵon el alta idealo.

Sufiĉas prostituo de vol', kuraĝa penso; — ni devas plene ĝui spiritan liberecon; per penoj de klarvida kaj sanpotenca menso ni kreas fine Amon kaj Veron kaj Belecon!

PERLAS PER LA BELO STELO-STILO

Perlas per la belo stelo-stilo,
kun facile ŝprucas Esperanto —
gaja tril' de l'najtingalbabilo
dum trankvilo de l' printempa kanto.

Amo de l' univeseca koro
en kristalo de l' penetra penso
brilnuancas en bukedo-floro,
sonparfumas en versaĵ-incenso,
vibras en la melodioj-ĉarmoj, —
fibroj de l' animo poezia, —
en ĝoj-ploro aŭ maldolĉaj larmoj,
en intimo kun revad' vizia.


Torento de l'pasi-deziro
sur la verda kampo de la amo,
radieco de l' revad-inspiro
kaj neniam foriganta flamo.
Antaŭ la ĝardeno de l' beleco,
permanenta celo al grandozo,
for de l' korpo en la animeco
estas mia farnient-ripozio.

MI STELOJN JUNGOS. . .

Mi stelojn jungos al revado,
kaj ili portos min tra bluo
en landon de la nemortado,
de la eterna vivo-ĝuo.

Do, arogantu mia kanto,
do, akresonu mia verso.
Mi estas forto kaj giganto
kaj regontul' de l' universo.

La morto?! Ho, ĝi plu ne tedos,
restinte sola nur simbolo;
je l' universo nur procedos
la menso de l'scienca volo.



Jus aperis en rusa lingvo verko de Josif Lazarevič Portnoj — kandidato de historiaj sciencoj kaj docento pri marksismo-leninismo en la Politeknika Instituto de u. Karaganda (Kazaĥa SSR). La nomo de la aŭtoro estas konata al la bulgaraj esperantistoj, ĉar li jam kelkfoje gastis al Bulgara Esperantista Asocio, studante konkretajn materialojn kaj dokumentojn pri la

LEGENDECA STANDARDO

ligoj inter la soveta kaj bulgaraj esperantistoj en la pasinteco kaj nuntempe.

La recenzata verko estas dediĉita plejparte al la historio de ruĝa standardo, donacita al la konstruistoj de la fama dum la unua Kvin-jarplano grandega Turksib (Turkestana-Siberia Fervoja Magistralo). Tiu longega magistralo devis pasi tra nekulturitaj stepoj, riveregoj kaj montoj por ligi la kotonriĉajn sovetajn socialismajn respublikojn en Mez Azio (ĉiuj tiutempe nomataj Turkestano), kun la riĉa je cerealoj, valoraj arbaregoj kaj industriaj entreprenoj Siberio. Nur la konstruado de mondekonata Dneproges (grandega elektrostacio sur la riverego Dnepro) superis laŭ siaj dimensioj la faman Turksib.

La menciita ruĝa standardo estis ellaborita en la fervoja riparfabriko en urbo Kirchmöser (Germanio) proksime al u. Brandenburg (nun distrikto Potsdam). La fervojistaj laboristoj en tiu uzino deziris esprimi sian moralan-politikan subtenon al la konstruantoj de Turksib-magistralo. La transdono de la standardo estis malfacile realigeb-

la pro multaj obstakloj far la bulgaraj reĝimoj en Germanio, Litovio kaj Pollando. Tamen triopo de kuraĝaj germanaj antifaŝistoj sukcesis transporti ĝin en 1932 en Sovet-Union kiel konkretan esprimon kaj simbolon de la revolucia proleta internaciismo de la germana proletaro al la venkinta soveta laborista klaso, konstruanta socialisman sociordon en la unua en la historia laborista-kamparana ŝtato.

Direktante sin al Germana Demokratia Respubliko por eltrovi la spurojn de la siatempe (antaŭ duonjarcento) donacita standardo, la aŭtoro survoje deflankigas al Bulgario. Li faris tion por ricevi helpon fare de bulgaraj esperantistaj veteranoj kiuj tiutempe havis ligojn tiel kun soveta kiel ankaŭ kun germanaj laboristaj esperantistoj. Ricevinte tiun valoran helpon li jam pli sukcese plenumis sian scienc-esploran mision en GDR.

La tuta verko estas ege interesa kaj la leganto ne ellasas ĝin ne atinginte la finon.

Nikola ALEKSIEV,
veterana esperantisto

Kumeŭaŭa la filo de la ĝangalo

TIBOR SEKELJ

Por niaj junaj legantoj la redakcio daŭrigas publikigi la aventurojn de la indiana knabo Kumeŭaŭa, pri kiuj ni ekrakontis en n-ro 9/1987 de „Bulgara Esperantisto“.

FISKAPTADO KUN KUMEŬAŬA

Mi ne scias kial li ĝuste min elektis por akompani lin, sed matene, antaŭ la sunleviĝo, la indiana knabo vekis min:

— Njikuĉap voli iri kun Kumeŭaŭa ŝia fiskapti?

La vorto „Njikuĉap“ signifas „barbulo“ en unu el la indianaj lingvoj, kaj tiel la indianoj kutime nomis min, pro la granda barbo, kiun mi portis en tiu tempo.

Kompreneble, mi volonte akceptis la inviton. La knabo estis al mi simpatia ekde la unua momento. Li jam estis pretiginta sian pirogon, en kies fundo jam kuŝis lia ilaro por fiskaptado. Tiu ĉi konsistis el arko kun pluraj sagoj kaj harpuno el longa bastono kun forta fera pinto, ligita al la pruo de la pirogo per longa ŝnuro. Tiun ĉi armilon oni uzas por kapti grandajn fiŝojn.

La indianeto sidigis sur la poŭpon de la pirogo, de kie li per malgranda padelo lerte direktadis la mallargan, ŝanceligantan boaton konstruitan el unusola trunko. La frumatena aero sentigis freŝecon agrablan en tiu tropika regiono de Amazonio. Ambaŭflanke de la rivero Aragvajo levigis, kvazaŭ du

malhelaj muregoj, la ĝangalo kun siaj arboj kaj arbustoj kaj dense interplektita nedifinebla vegetaĵaro. Ni navigis apud la maldekstra riverbordo, kaj tute klare ni povis aŭdi la kriojn de multaj bestoj.

— Tiu ĉi, kiu tiel laŭte krii, nomata la hurlanta simio, — diris Kumeŭaŭa. — Ni tuj alproksimiĝi al ĝi.

Li mansignis al mi ke mi ekpadelu, kaj li mem per sia padelo tute senbrue direktis la pirogon al granda arbo sur la bordo, kun granda branĉaro klinita super la akvo. Tie li apogis la boaton sur la bordon.

— Cu vi vidi ĝin? . . . Tie ĝi sidi.

Ie, sur unu el la plej altaj branĉoj, mi ekvidis hurlantan simion. Ĝi seniluziigis min. Laŭ la potenco hurlado mi imagis ĝin granda kiel leono, sed fakte ĝi havis la grandecon de mezgranda hundo. Kiam ĝi volas aŭdigi sian potencon hurlan voĉon, ĝi plenigas per aero grandan vezikon, kiu troviĝas sur ĝia kolo. Kiam ĝi denove eligas

JAPANOJ GASTE AL NI

En la sunplena kaj festa tago de la 2-a de aŭgusto 1987 dekrimembra japana grupo surterigas sur la flughaveno de Sofio. Kial festa? Naŭ japanaj infanoj, akompanataj de siaj gepatroj, por unua fojo vizitas foran Bulgarien cele konatiĝi kun bulgaraj infanoj kaj sperti la etoson de la vivo en la junpioniraj tendaroj. La bulgaraj dommastroj preparis por ili agrablajn surprizon. Du junpionirinoj, vestitaj en folkloraj kostumoj, bonvenigas la karajn gastojn per varmaj vortoj.

Kiuj estas tiuj infanoj kaj kiu invitis ilin? La ideo aperis en 118-a Sofia Mezlernejo „L. Stojanov“. Fine de 1985 tiu lernejo unua en Bulgario kolektis subskribojn sub la „Apelo al Hiroŝima kaj Nagasaki por totala malpermeso kaj elimino de nukleaj armiloj“. Tie kreiĝis la ideo, ke japanaj kaj bulgaraj infanoj vizitu reciproke Bulgarien kaj Japanion omaĝe al la Internacia Jaro de Paco 1986. Sed la ideo realiĝis apenaŭ aŭguste 1987.

La bulgaraj dommastroj — kelkaj E-familioj kun siaj infanoj, preparis por ili riĉan 5-tagan programon. Indas menci tiu impresajn el la programeroj, nome vizito de junpioniraj tendaroj en vilaĝoj Slišovci kaj Kovačevci, distrikto de Pernik. En ambaŭ tendaroj la junpioniroj kaj iliaj gvidantoj renkontis la gastojn laŭ malnova bulgara kutimo — per salo kaj pano. Tio multe impresis niajn forajn amikojn. Sed plej emociaj por la gastoj estis la horoj de amikiĝo kun la bulgaraj junpioniroj. Ili kune ludis, dancis, amuziĝis, prezentis belartajn programojn. La japanaj infanoj admiris la belajn dormoĉambrojn, manĝejon, ludkaj sporthalojn, ĉambrojn por ŝatataj okupoj ktp.

Neripetebla restos la momento, kiam japanaj, bulgaraj kaj polaj geknaboj respektis la memoron de la granda internaciisto kaj popolgvidanto Georgi Dimitrov antaŭ lia muzeo kaj gepatra domo en v. Kovačevci.

La gvidanto de la japana E-delegitaro s-ano Syōzi Nanba, ĝenerala sekretario de Japana Pacdefenda Esperantista Asocio kaj sekretario de MEM, kune kun la ceteraj plenaĝaj siaj samnacionoj kaj la bulgaraj akompanantoj estis oficiale akceptitaj de la gvidantaro de la Junpionira Tendaro en v. Kovačevci. En amika etoso oni interŝanĝis opiniojn pri edukado de infanoj en la lernejo kaj ekster ĝi, pli ilia edukado en spirito de internaciismo, interkompreniĝo kaj paco.

Kortuŝa estis la akcepto de la foraj gastoj ankaŭ en Blagoevgrad, fare de la tieaj junpioniroj. Oni renkontis la japanojn en la Centra Domo de la Junpionira Komplekso „Vitoŝa“. Tiu belega komplekso ampleksas plurajn rekonstruitajn dometojn en malnova bulgara stilo, amfiteatre situantajn. Ĉiu dometo estas destinita por iu ŝatata okupo — literaturo, muziko, historio, pentroarto ktp., kie la junpioniroj el la urbo venas kaj pasigas agrablajn kaj kreaĵajn horojn.

Por la japanaj gastoj la amikaj kaj varmaj renkontiĝoj kun la bulgaraj junpioniroj estis eksterordinara evento en ilia vivo, ĉar en Japanio ne ekzistas junpionira organizaĵo. La infanoj el tiu fora lando admiris la organizan kaj plensangan vivon de la bulgaraj junpioniroj en ilia organizaĵo.

Ce la adiaŭo kun siaj bulgaraj dommastroj kaj iliaj infanoj, la japanaj gastoj ploris. Tio estas pruvo, ke ne ekzistas landlimoj kaj lingvaj baroj por la internacia amikeco, por la homa interkompreniĝo, por la paca kunvivado. La japanaj infanoj certe multon rakontos al siaj geamikoj kaj proksimumoj pri siaj travivaĵoj en pacama Bulgario. Kaj ili estos la portantoj de la plej noblaj ideoj — internacia solidareco kaj frateco inter la infanoj el la tuta mondo.

Vasja CVETKOVA,
sekretario de MEM

la aeron, ekestas la timiga sono, kiu certe multajn bestojn sukcesas fortimigi.

Dum ni sidis sub tiu arbo, rigardante la simion, alflugis du tukanoj. Strangaj birdoj ili estas. Ilia plumaro estas flava kaj grandega, tiel larĝa kaj longa, kiel ilia korpo mem. Pro tio, kiam ili flugas, oni havas la impreson, kvazaŭ la beko tirus malantaŭ si la birdon. Tamen, tiu granda beko ne malhelpas la tukanon en la flugado, ĉar ĝi estas malplena, do tre malpeza.

La knabo ekmontris al iu arbusto. Komence mi nenion povis vidi en tiu direkto. Fine tamen mi rimarkis, ke la branĉo estas plenplena de birdetoj. Ili estis ege malgrandaj, kelkaj ne pli grandaj ol abeloj. Ili estis kolibroj. Abundis sur ili la koloroj. Unu havis longegan kaj maldikan bekon. La vosto de alia konsistis el du longaj interkrucigantaj plumoj. Tria havis ruĝan kvaston sur la eta verda kapo. Ĉiuj tiuj etaj estaĵoj movadis siajn flugojn tiel rapide, ke tiuj fariĝis preskaŭ nevideblaj. Dank' al tio ili povis libere ŝvebi en la aero

samloke, dum ili interparoladis trankvile kun la najbarino de la alia branĉo, aŭ pripensadis sur kiun branĉon eksidi.

Ili estas veraj naturaj helikopteroj. Tio multe da kolibroj troviĝis sur la arbusto, kvazaŭ ĝuste tie estus okazanta ĝenerala kunveno de kolibroj. Kaj iliaj pepado estis vigla kaj gaja, kaj mi ne povis kompreni, kiel ili komprenas unu la alian, se ĉiuj pepas samtempe.

Subite ili eksilentis. Ankaŭ aliaj bestoj eksilentis. En la tuta arbaro nenio estis aŭdebla. Nur du simioj sur branĉo mallaŭte kaj nerveme flustris ion.

— Ni rapidi for de tiu ĉi loko. La bestoj anonci iun danĝeron! — diris mia kunvojaĝanto.

Per la padeloj ni forpuŝis la piron de la riverbordo kaj haltis meze de la akvo, scivolemaj pri tio, kio okazos.

Post nelonga atendado la densa verdo de la praarbaro malfermiĝis, kaj inter la foliaro aperis granda, fortika jaguro. La sovaĝbesto mar-



ŝadis malrapide kaj majeste. Nun ni komprenis, kiu estas la danĝero antaŭ kiu ĉiuj aliaj bestoj sin kasis.

— La jaguaro, reĝo de la ĝangalo, — prezentis al mi ĝin Kumeŭaŭa flustre.

La besto malrapide descendis al la riverbordo kaj klinis la kapon por trinki akvon. Observante ĝin, ni retenis la spiron pro emocio. Kaj ŝajnis ke ĉiuj bestoj de la ĝangalo faris la samon, ĉar nenio sono estis aŭdebla en la proksimeco. Nur kiam la jaguaro denove ma-



JOËLLE RABU RABIS LA KORJOJN

parte neesperantistoj. La intereso al la kantistino unuavide ŝajnis nesufiĉa, sed jam de la unua kanto la profunda voĉo de Joëlle emociis la publikon kaj rabis la korojn. La tuta koncerto estis filmita de la Bulgara Televido.

La tagon post la koncerto mi vizitis la kantistino en la hotelo kaj ĉe glaso da kafo ni konversaciis pli ol unu horon.

— *Joëlle, kiam vi komencis lerni Esperanton?*

— Antaŭ unu jaro, por la Universala Kongreso en Ĉinio mi eklernis la Internacian Lingvon. Al mi helpis mia amiko Wally du Temple, kiu liveris al mi librojn, diskojn, kasedojn. Post la kongreso mi tiel ekŝatis la lingvon, ke mi decidis serioze okupiĝi pri ĝi. La jubilea kongreso en Varsovio estas la dua E-kongreso, kiun mi vizitas.

— *Kio estas por vi la Internacia Lingvo?*

— Por mi Esperanto estas ilo, per kiu mi povas konatiĝi kun diversaj naciaj kulturoj. Estas tre grave, ke ĝi ne estas politika aŭ religia laŭ sia esenco.

— *Mi pensas ankaŭ, ke ni devas in-*

strui niajn infanojn vivi en paco. Miaj gepatroj rakontis al mi kiel ili suferis dum la milito. Kaj mi ne volas iri ilian malfacilan vojon. Por mi Esperanto estas lingvo de la paco.

— *Kiel vi ekkantis?*

— Estis hazarda afero, kiam antaŭ kvar jaroj mi komencis kanti. Mia frato eksciis, ke estas serĉata aktorino, kiu povu kanti dulingve — france kaj angle — por la spektaklo „Piaf, ŝiaj kantoj, ŝiaj amoj“. Mi gajnis kaj ludis la rolon de Edit Piaf. Dum la teatraĵo mi kantis 20 kantojn.

Pleje mi ŝatas amikantojn, kantojn pri la vivo kaj tiuj, kiuj havas ian historion.

— *Via opinio pri Bulgario?*

— Ĝi estas belega lando. Kaj la popolo havas varman koron. Tie ĉi mi gajnis multajn amikojn. Emociis min la publiko dum la koncertoj kaj tiom multe da homoj venis poste por vidi min kaj interparoli kun mi.

— *Dankon, Joëlle! Koran akcepton ĉie en Esperantujo!*

Intervjuis: Veneta BALEVA
Foto: Lasto NIKOV

La eŭropa turneo de la famiginta lastatempe E-kantistino Joëlle Rabu havis kiel lastan punkton Bulgaron. Post sukcesa sinprezento antaŭ la multnombra kongresanaro en Varsovio, la kanada kantistino kun sia orkestro faris dektagan viziton en Jugoslavio kaj alvenis gastis al la bulgaraj samideanoj.

Ŝian rondvojaĝon tra Bulgario konsistigis koncertoj en la Internacia Esperanto-Kursejo „Pisaniĉa“, en la montara ripozloko „Pamprovo“ kaj en Sofio. La koncerto en la ĉefurbo okazis la 20-an de aŭgusto 1987 en la Parko de la Libero sur la scenejo de ĝia somera teatro. Ĝin vizitis multaj homoj, grand-

laperis en la densejo, la arbaro ree ekvigligis. Ni ekpadelis tiam en la direkton de la fluo de la rivero.

Post iom da tempo mi ekaŭdis mallaŭtan zumadon en la malproksimo, kiu fariĝis iom post iom pli laŭta, kaj fine transformiĝis en bruegon de kiu nia haŭto krispiĝis. Per rigardo mi demandis la knabon, kio ĝi estas. Li diris:

— Kaskadeto. Dangera por tiuj, kiuj ne koni la riveron.

Ŝtonoj elstaris el la akvo kaj la fluo fariĝis rapidega. Ni eniris en la kaskadeton. La fluo portis nian pirogon jen dekstren jen maldekstren, kun grandega rapideco.

— Nun ne remi, Njikuĉap! — kriis la knabo.

Mi ĉesis remi kaj atendis kun streĉitaj nervoj, ke nia pirogo koliziu kontraŭ ŝtonego kaj disfalu en pecetojn. Sed la indiano manovris per sia padelo tiel lerte ke li sukcesis enkonduki la pirogon en la plej trankvilan parton de la fluego. Nia rapideco pligrandigis tuj poste. En certa momento ŝajnis al mi ke ni flugas rekte kontraŭ rokon.

— Nun remi! Remi per tuta forto, Njikuĉap! — estis la ordono, kiu

apenaŭ atingis mian oreton tra la infera bruego.

Mia padelo frapegis la akvon kvazaŭ maŝino. Kumeŭaŭa per siaj fortaj kaj rapidaj movoj elvokis mian admiron. Je nur du metroj antaŭ la roko, eble unu sekundon antaŭ la kolizio mia kunulo enpŝis sian remilon oblikve en la akvon kun tia firmeco, ke la pirogo subite devojiĝis maldekstren, preterflugante je duonmetro la ŝtonegon. Ni tute certe kolizius kontraŭ ĝi, se la filo de la ĝangalo ne agus tiel lerte kaj decide.

Post kelkaj pluaj manovroj ni sukcese transiris la tutan kaskadon, kaj eniris en pli trankvilajn akvojn. La fortostreco ege laciĝis nin. Kumeŭaŭa ekkuŝis sur la poŭpon de la boato, kaj mi sur la pruo, vidalvide de li. Kun feliĉa rideto sur la lipoj ripozis la knabo, observante la blankajn, kotonecajn nubetojn sur la trankvila ĉielo, dum la pirogo senbrue dravis pluen.

— Sen via lerteco ni povus pereii sur tiu ĉi loko, — mi diris.

„La akvon kaj la sovaĝbeston vi devi mastri, se vi ne voli ke ili mastri vin“ diri maljuna Maloa.

Ekzisti ankaŭ alia, pli facila transiro, sed tiu ĉi pli ekscitiga.

La pirogo malrapide progresadis. La knabo sin levis:

— Ci tie la akvo profunda. N fiŝkapti.

Laŭ lia deziro mi ekŝidis sur la poŭpon kaj remis malrapide, laŭ liaj mansignoj, jen dekstren jen maldekstren. Li ekstaris sur la pruo, kun sago kaj arko en la manoj. Li staris rekte, kvazaŭ bronza statuo, kaj la bruna koloro de lia preskaŭ tute nuda korpo mirinde bele harmoniis kun la milda bluo de la matena ĉielo. Lia glata nigra hararo pendis ĝis la ŝultroj. Lia nazo estis trapezoida per eta bastono, kaj liaj vangoj estis ornamitaj per po unu tatuita nigra ringo. Tiu ĉi estis la singno de la tribo Karaĵa al kiu li apartenis. Ĉirkaŭ la kapo estis streĉita mallarĝa verda rubando, el kiu malantaŭe elstaris granda agla plumo. Lia sola vestaĵo konsistis el du kvadrataj tuketoj, el kiuj unu pendis antaŭe alia malantaŭe, ligitaj per ŝnuro ĉirkaŭ la talio.

SUR LA MALGRANDA EKRANO

Omaĝe al la 100-jara jubileo de la Lingvo Internacia la sekretario de la Sofia Esperanto-Domo de Kulturo „Maksim Gorkij“ Bojdar Aleksiev organizis la 10-an priesperantan televid-elsendon. La speciala duonhora programo estis en la rubriko „Leciono pri ĉio“, destinita por mezlernejoj, kaj elsendiĝis la 23-an de aŭgusto 1987 laŭ unua televidprogramo. La diskutinda temo estis „Problemoj kaj sukcesoj ĉe la lernado de Esperanto kaj ĝia loko inter la nuntempaj lingvoj“.

Partoprenis la poeto-esperantisto kaj ĉefredaktoro de la populara en Bulgario semajna revuo „Paraleli“ Venelin Mitev, la sekretario de BEA kaj ĉefredaktoro de Internacia Esperanto-Kursejo inĝ. Angel Todorov kaj la sekretario-metodikisto ĉe la Fakopri Instru-agado kaj Kvalifiko de BEA Nedka Valjaviĉarska. Aktive partoprenis ankaŭ la gelernantoj el 8-a mezlernejo „Vasil Levski“, jam trian jaron devige studentaj Esperanton.

La enkondukaj vortoj de Venelin Mitev rilatis la sukceson de la kreita de L. L. Zamenhof internacia lingvo Esperanto dum la pasinta jarcento. Li trarigardis la historion de la multnombraj artefaritaj lingvoj, inter kiuj vivkapablon kaj avantaĝojn kiel universala helplingvo montris nur Esperanto.

Nedka Valjaviĉarska detale klarigis kiumaniere oni povas lerni Esperanton kaj la kondiĉojn pri fakultativa studado laŭ la permeso de la Ministerio de Klerigo.

Simple kaj sincere la partoprenantaj lernantoj rakontis kial ili elektis lerni Esperanton, menciis sian korespondadon kun eksterlandaj amikoj kaj eĉ esprimis opinion pri profesia okupado pri Esperanto.

Inĝ. Angel Todorov rakontis pri la funkcio kaj agado de IEK, kiel loko por lernado, praktikado kaj faka apliko de la Internacia Lingvo.

La elsendo per Bulgara Televido estis ĝustatempa kaj bone ligitis kun la tutmondaj solenaĵoj, rilate la 100-jariĝon de Esperanto kaj la komencon de la nova lernojaro. Sur la malgranda ekrano ree eksonis Esperantaj vortoj. Ni kredis, ke la bona tradicio, establita tiurilate, daŭros ankaŭ estonte!

Inĝ. A. TODOROV
Foto: Veneta BALEVA



Nedka Valjaviĉarska kaj Angel Todorov antaŭ la televida kamero.

Li staris trankvile per la rigardo penetrante profunden en la malhelan akvon.

Subite Kumeŭaŭa elpafis la sagon, kiu malaperis en la akvo. Senspire ni atendis ĝian reaparon. Kiam la plumoj de la sago elmergiĝis el la akvo, la knabo atingis per sia arko kaj altiris ĝin. Sur la alia fino de la sago baraktis senespera duonmetron longa fiŝo. Ni deprenis ĝin de la sago kaj lokigis ĝin sur la fundo de la boato.

Ni daŭrigis la navigadon, kaj dum la proksima duonhora mia kamarado kaptis pliajn kvin fiŝojn, el kiuj du estis eĉ pli grandaj ol la unua. En iu momento li eksciite signis al mi, ke mi direktu la pirogon maldekstren. Samtempe li demetris la sagon kaj arkon, kaj ekprenis la harpunon. Li kontrolis ĝian feran pinton kaj la bastonon. Li trarigardis ankaŭ la longan ŝnuron, per kiu ĝi estis ligita al la pruo de la pirogo. Mi konjektis ke li estas malkovrinta iun tre grandan fiŝon. Li ekkuris por vidi de pli proksime la profundajn. Tiel li restis senmova, kun streĉita atento, dum certa tempo. Poste li donis al mi signon ke mi direktu la pirogon

dekstren. Tiam subite li etendis sian maldekstran brakon, kiel faras la lancjetuloj, samtempe li forte svingis la harpunon kaj ĵetis ĝin en la akvon.

Dum kelkaj sekundoj ni ne sciis, ĉu li trafis sian celon aŭ ne. Tiuj kelkaj sekundoj ŝajnis al ni eternaj. Fine la harpuno, kies finaĵo elstaris el la akvo, komencis malproksimiĝi de la pirogo, deruligante la ŝnuron per kiu ĝi estis ligita al la boato. Kiam la tuta ŝnuro estis en la akvo, ĝi streĉiĝis kaj nia pirogo ekveturis tirata de iu nevidebla subakva forto. Devis esti grandega tiu fiŝo kiu, furiozinta pro la ricevita vundo, trenis post si nian pirogon dekstren kaj maldekstren, kvazaŭ iun ludilon. Kumeŭaŭa ekkuris sur la pruan, por ke subita movo ne ĵetu lin en la akvon.

Post deklinuta freneza veturado, nia movigado fariĝis malpli rapida, kaj fine ni ekhaltis. Nun ni komencis altiri la ŝnuron, poste la harpunon, kaj fine kun granda peno la fiŝon. Ĝi estis preskaŭ du metrojn longa fiŝego „piraruku“, unu el la plej bongustaj loĝantoj de la amazoniaj riveroj.

Kiam la fiŝego jam kuŝis en la boato, kaj ni eksidis por ripozi iomete post la streĉa laboro, mi esprimis mian admiron al la eta indiano. Ne donante gravecon al la afero, li respondis.

— Ĉiuj bestoj scii trovi al si nutraĵojn. Ankaŭ homo devi scii. — Jes, — mi diris — sed vi ankoraŭ ne estas viro, vi estas nur knabo!

— Ne! Rigardu tiujn ĉi du nigrajn ringojn tatuitajn en miajn vangojn. Ili signifas, ke mi estas plenaĝa viro.

— Mi ne komprenas. Rakontu al mi pri tio, Kumeŭaŭa.

— Nun ni ne havas tempon por tio. Parolante ni forpelos la fiŝojn. Viaj amikoj atendi nin kun la stomakoj malplenaj.

— Sed diru almenaŭ kelkajn vortojn pri la tatuitaj ringoj, mi estas scivolema.

— Malo! diri: „La veron vi ekscii nur se vi povas kaŝi vian scivolemon.“

Mi eksilentis, kaj klopodis ŝajnge min indiferenta, kvankam mi plej volonte en tiu momento eksplodis kiel bombo.

TRADICIAJ TURISTAJ TAGOJ

En 1986 la ĉiujara festo de montodomo „Esperanto“, transformiĝis en Turistajn Esperanto-Tagojn en Sofio (TET). Tiu ĉi arango, kiu daŭras kvar tagojn, rapide populariĝis kaj estas amase vizitata de geesperantistoj kaj amikoj de nia lingvo. En 1986 la partoprenantoj en TET estis ĉirkaŭ 300 kaj ĉi-jare ili superis 500.

La 17-an kaj la 18-an de septembro k. j. la partoprenantoj vizitis kun Esperanto-ĉiĉerono la Etnografian muzeon, la Nacian bildgalerion, muzeon „Tero kaj homoj“, Arkeologian muzeon kaj kelkajn aliajn ĉefurbajn vidindaĵojn.

La sekvan tagon — sabate, sepdeko da geesperantistoj kolektiĝis en legejo „Videlina“ — kvartalo „Panĉarevo“. Tie ĉi la organizantoj — la urba E-organizo en Sofio kaj Turista Esperanto-Centro, preparis distran programon plenumatan de esperantistoj, precipe el la E-kursoj por turistoj. Ili ludis skeĉon, kantis, deklamis. Post duhora programo la ĉeestantoj promenis per ŝipeto sur la lago, kantante Esperanto-kantojn. Esperanto dominis ne nur en la oficiala programo, sed ankaŭ en la interparoloj de la partoprenantoj.

La Turistaj Esperanto-Tagoj estis fermitaj la 20-an de septembro per granda festo-solenaĵo okaze de la centjara jubileo de la Internacia Lingvo. La festo okazis sub ĉiele — ĉe montodomo „Esperanto“. Per dukoloraj afiŝoj pendigitaj tra la ĉefurbo la organizantoj celis altiri la atenton de sofianoj al Esperanto kaj konvinki multajn el ili partopreni la feston kaj lerni la lingvon. Sloganoj, standardoj, flagetoj ornamis la scenejojn kaj la korton de montodomo „Esperanto“ konstruita sur la monto Vitoŝa. S-ino Stefka Cenková el la Turista Esperanto-Centro, koncize sed trafe kaj per multaj ekzemploj parolis pri la jubileo kaj la sukcesoj de la Esperanto-movado. La belarta programo estis interesa kaj varia. Kantis junulina grupo „Verda Stelo“, ensemblo „Medikus“ kaj Margarita Radulova. Deklamis siajn versaĵojn Maria Manoleva. Humuro, baletoj kaj pantomimo ankaŭ ne mankis. Dudekses afganaj infanoj, kiuj lernas en Bulgario, kantis en bulgara, afgana kaj rusa lingvoj. La gajaj kaj amuzaj konkursoj multe ĝojigis la partoprenantojn. Je la fino deko da grupoj kaj unuopuloj utiligis la eblecon aperi sur la scenejo per siaj programeroj.

Kiel rezulto de ĉi-jara TET, 63 partoprenantoj esprimis deziron lerni Esperanton en la kursoj por turistoj. La direktoro de Nacia Parko „Monto Vitoŝa“ konsentis kunlabori por plibonigo de la tereno ĉirkaŭ nia montodomo. La estraro de legejo „Videlina“ en Panĉarevo decidis organizadi Esperanto-kursojn kaj disponigi senpage siajn ejojn por Esperanto-arangoj.

Kolju KOLEV

DENOVE LAŬ DANUBO

Ci-jare organizanto kaj dommastro de la 32-a Internacia Danuba Remado estis Bulgara Turista Asocio. Du monatojn daŭras tiu ĉi grandioza arango. Junuloj, ĉe infanoj, kaj plenkreskuloj remante traveturis la tutan aŭ parton de la distanco, kiu longas 2082 km.

Nia grupo de geesperantistoj, kiuj partoprenis la remadon de urbo Vidin ĝis urbo Silistra, konsistis el 13 gebulgaroj kaj unu nederlandanino. En 14 tagoj remante ni traveturis 421 km. Ĉiutage ni trapasis po 40—50 km. Post la remado ni, samkiel la aliaj preskaŭ 300 personoj el dek landoj, starigis niajn tendojn, preparis la vespermanĝon. Sed ni uzis la tempon ankaŭ por propagandi Esperanton. La verdaj flagetoj kaj tolaj sloganoj ĉiam estis fiksitaj sur niaj tendoj. Samideano Ĉ. Kunčev estis kuracisto de la remantoj. Sur lia tendo Esperante ornamita flirtis ankaŭ ruĝkruca standardo por orientigi la bezonantojn kuracistan helpon. Inter ni estis kelkaj tute novaj esperantistoj kaj por ili ni organizis prelegon pri Esperanto kaj ĝia movado. Post tio sekvis rapida Esperanto-kurso.

En la kampadejoj ni disdonis multe da flugfolioj pri Esperanto en bulgara kaj germana lingvo. Afiŝoj pri la centjarigo de la Lingvo-Internacia estis pendigitaj en konvenaj lokoj.

Post alveno en Kozloduj ni partoprenis ceremonion pri meto de florkrono antaŭ la monumento, kie Hristo Botev kaj liaj kunuloj, veninte el Rumanio, komencis la batalon kontraŭ la turkoj por la liberigo de Bulgario. Post la ceremonio sesdeko da personoj, precipe germanoj kaj bulgaroj, eniris la ŝipon-muzeon, per kiu la bulgaraj ribeluloj venis Bulgariion. Pro miskompreno la bulgaro, kiu devis traduki germanen la klarigojn pri la muzeo kaj pri la herooj de la ribeluloj forestis. Por ke ni helpu mi tradukis la bulgaran parolon en Esperanton al nia samideano-nederlandano W. Dorieijn, kiu parolas germane. Tiel pere de Esperanto la germanoj povis kompreni la donatajn klarigojn.

Ce nia alveno en vilaĝo Bajkal, kie ni havis ripoztagon, ekpluvis. Malgraŭ la malbona vetero la renkontiĝo de la remantoj-esperantistoj kun gesamideanoj el Sofio, Pleven kaj Levski estis bone organizita en la turista domo „Abelo“.

Dekdu personoj el nia grupo alvenis en Silistra kaj partoprenis la bankedon, kie oni anoncis la finon de la remado.

La kampanjo de la Internacia Asocio „Monda Turismo“ por enkonduko de Esperanto en la Internacian Danuban Remadon komencis doni rezultojn. Organizantoj kaj partoprenantoj en tiu ĉi arango ne nur aŭdis pri Esperanto, sed estis bone informitaj. Deko da remantoj jam lernas la lingvon. Oni devas organizi pli multe da similaj nekutimaj por nia movado aranĝoj por pli vasta popularigo de la lingvo kaj ĝia praktikado. Krome, tiaj internaciaj aranĝoj donas eblecon al la landaj E-asocioj kunlabori kaj kunagi internaciskale.

Nikola NIKOLOV

Leteroj de korespondencmiko

ESPERANTO-MUZEO EN FRANCIO

La 16-an de majo 1987 en la malnova urbeto Gray, Orienta Francio, estis solene inaŭgurita Esperanto-muzeo. Krom lokaj aŭtoritatuloj ĉeestis delegitoj el Parizo, germana grupo, la ĝenerala konsulo de Pollando k. a.

La muzeo okupas 10 salonojn de eksa liceo (230 m²). Ĝi havas bibliotekon kun pli ol 3000 titoloj, konstan-

tan ekspozicion de revuoj kaj ĵurnaloj — ekde la naskiĝo de Esperanto ĝis nun.

En la speciale eldonita faldfolio interalie oni legas: „Dank“ al kreado de tiu „konservejo“, neniam plu oni devas aŭdi pri perdo aŭ detruo de ĉio, kio temas pri la historio aŭ la vivo de Esperanto.

La bulgaraj esperantistoj gratulas siajn francajn gesamideanojn pro ilia grava akiraĵo.

(Laŭ *Letero de mia korespondantino M-me Baudry el Parizo*, kiu partoprenis la oficialan inaŭguron de la muzeo).

Maria P. ANGELOVA



KOMUNA EKSPOZICIO

Fervojista Esperanto-societo „Fervojista Impeto“ ĉe la stacidomo en Gorna Orjahovica, komune kun urba societo „Espero“ aranĝis de la 17-a ĝis 27-a de julio j. k. ekspozicion okaze de la 100-jariĝo de Esperanto.

Sur 50 tabuloj estis prezentitaj fotoj de IFEF-kongresoj en diversaj landoj. „Espero“ montris fotojn el la esperantista movado aranĝitaj sur kelkaj tabuloj. La fotoj apartenas al s-ino Nejkova. La organizantoj ankaŭ montris diversajn esperantaĵojn — revuoj, ĵurnaloj kaj lernolibroj eldonitaj en diversaj landoj.

La ekspozicio vekis grandan intereson inter la loĝantaro, la fervojistoj kaj pleje inter la lernantoj.

Boris GANEV

UTILA AKIRAJO



La 16-a de majo j. k. estis vera festo por la esperantistoj en Sliven. Okazis solenaĵo dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto, kaj inaŭguro de nova Esperanto-klubejo. Gastis samideanoj el la tuta lando, reprezentantoj de sociaj kaj amasaj urbaj organizoj, multaj civitanoj. Inter la ĉeestantoj estis ankaŭ la estimataj veteranoj Mihail Kănev, Georgi Kavlakov kaj Ivan Bojaĝiev.

En sia raporto la prezidanto de DE de BEA Venelin Vasilev parolis pri la 100-jara historio de Esperanto en la mondo kaj pri la disvastigo de E-movado en Sliven. Estis substrekita la granda kontribuo de la Internacia Lingvo al la batalo por monda paco kaj

interkompreniĝo. En la nomo de CE de BEA la partoprenantoj salutis Cvetka Miteva. Eldirojn faris ankaŭ samideanoj el Burgas, Jambol, Kotel, Gălăbovo, Ruse, Pazarĝik, la veteranoj.

Antaŭ la pordo de la novkonstruita klubejo, la gastoj, laŭ malnova bulgara kutimo, estis bonvenigitaj per pano kaj salo. La malnova revo de slivenaj esperantistoj jam estas realaĵo.

Stojanka DRÂNDEVA

FESTA KUNVENO

La 2-an de septembro 1987 en la klubejo de la Sofia Esperanto-Domo de Kulturo „Maksim Gorkij“ okazis solena kunveno, dediĉita al la 43-a datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario.

En sia prelego la sekretario de UE de BEA Ivan Peev skizis la heroan batalon de la bulgara popolo kontraŭ la faŝisma regado, memorigis pri la miloj da oferitaj homvivoj por nia libera hodiaŭa tago kaj substreki la fakton, ke multaj esperantistoj partoprenis la rezistan movadon.

Sekvis belarta programo, kiun partoprenis amatoraj kaj profesiaj aktoroj. Sur la podio unu post alia aperis lernantoj, salutantaj verse kaj kante la liberan vivon, kaj veteranoj-esperantistoj memorantaj la terurajn tagojn de la milito kaj malbenantaj ĝin.

Veneta DIMITROVA

„ĜIS BALDAŬ!“

Sur la scenejo dancas bela junulino kaj ĉarma juna viro. Ambaŭ estas vestitaj en popolkostumoj. La publiko ritme aplaŭdas permane kaj tiel akompanas la muzikon. Oni dancas „lezginka“.

Mi ne priskribas spektaklon aŭ folkloran vesperon. Tio estas impresoj pri la renkontiĝo de la junulara grupo el Dagestano (USSR), kiu partoprenis la internacian esperantistan laborbrigadon en vilaĝo Vraŭbevo, kun sofia esperantistaro. Ĝi okazis la 27-an de aŭgusto 1987 en la kafejo de la Domo de Bulgara-Soveta Amikeco.

La renkontiĝo estis organizita de UE de BEA. Pro la feria sezono la dommastroj-sofianoj ne estis multnombraj — plejparte membroj de la studenta E-societo „Vela Peeva“. Laŭ deziro de la gastoj estis invinitaj la redaktoroj de gazeto „Paco“ — Violin Oljanov kaj Veneta Baleva. La gastoj respondis al la multnombraj demandoj pri siaj lando, moroj kaj kutimoj, prezentis kantojn kaj versaĵojn Esperante kaj ruse. En amika etoso oni babilis pli ol tri horojn. Intertempe por la dezirantoj amuziĝi estis diskoteko.

„Ni foriras, lasante tie ĉi multajn amikojn, kaj ni kredas, ke ni denove intervidiĝos!“ — konfesis la gvidantoj de la grupo Abdurahman Junusov kaj Genadij Cernov.

Ankaŭ ni esperas, ke similaj renkontiĝoj inter junuloj-esperantistoj el Sovetio kaj Bulgario estiĝos pli oftaj kaj pli multnombraj.

Bojidar ALEKSIEV



GENERALA KONFERENCO DE MEM

La sekretariato de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), akceptante la proponon kaj koran inviton de Hungara MEM-sekcio, kunvokas la 11-an Generalan Konferencon de MEM en Budapeŝto inter 29-a de aprilo kaj 1-a de majo 1988.

La Konferenco okazos kun riĉa programo kaj modesta partoprenkotizo inkluzive tranoktadojn kaj manĝaĵojn.

Pri la konferenco kaj kondiĉoj de la aranĝo la interesgantoj povas legi detalan informon en gazetoj „Paco“ kaj „La Pacaktivulo“ aŭ ricevi ĝin kun aliĝilo de Esperanto-sekcio de junulara kaj studenta vojaĝoficejo „EXPRESS“ (H-1395 Budapeŝto, V. Szabadság tér 16. PF. 567. Telefono: 1-128-172).

Unua limdato por aliĝo estas 31-01-1988 kaj la lasta — 31. 03. 1988.

IFER'88

La Organiza Komitato de la „Internacia Fojra Esperantista Renkontiĝo“ (IFER) okazigos ĉi-tiun samnoman aranĝon de la 11-a ĝis la 13-a de marto 1988 en la foira urbo Leipzig.

La organizantoj konsiderante la fakton, ke nuntempe la faka aplikado de Esperanto en scienco, tekniko kaj kulturo ludas gravan rolon, elektis ĉeftemon „Homo kaj scienc-teknika revolucio“.

Jam oni petas de fakuloj proponojn pri prelegoj, kiuj rilatu al la ĉeftemo. Meze de 1987 aperis ampleksa bulteno, kiu enhavas ĉiujn kondiĉojn de partopreno. Ĉi-tiu informilo estas mendebla al la adreso de la IFER-OK — Kulturbund der DDR (Kulturligo de GDR), Organiza Komitato de „IFER'88“. Kätthe-Kollwitz-Straße 115, Leipzig DDR-7010.

Limdato por aliĝo estas la 31-a de decembro 1987. Post ĉi-tiu dato aliĝiloj restos netraktitaj!

La IFER-OK invitas ĉi foje fakajn asociojn ligitajn kun UEA al okazigo de iliaj jarkunvenoj en kadre de la „Internacia Fojra Esperantista Renkontiĝo 1988“. Organizoj, kiuj intencas profiti ĉi-tiun proponon, turnu sin eble plej baldaŭ al IFER-OK.

El nia leterkesto

KIU ESTOS MIA CENTA KORESPONDANTO?

Estimata Redakcio,

Lige kun la centjarigo de Esperanto mi decidis ekhavi cent gekorespondantojn. En daŭro de tri jaroj mi skribis al cent personoj. Ne ĉiuj respondis, sed mi ne senesperigas.

Kiu estos mia centa korespondanto? Eble vi, kara leganto? Se vi dezirus provi, mia adreso estas: 2300 Pernik, str. „Dímo Dímov“ bl. 1, ap. 8, por Cveta Popova.

Se vi, estimataj redakcianoj, bontrovus publikigi mian leteron en via revuo, eble ankau aliaj sekvos mian ekzemplon.

Samideane

Cveta POPOVA, sekretariino de E-societo „Nova Vojo“, Pernik

ĈU PENJO PENEV VERKIS ESPERANT-LINGVE?

La fama bulgara poeto Penjo Penev ne nur scipovis Esperanton, sed eble verkis en ĝi.

Pri tio „parolas“ unu el ekspozitaĵoj de la organizita en Sofio (9—24. 06. 1987) ekspozicio „Relikvoj el la fondusoj de la Bulgara Nacia Literatura Muzeo“. Inter la aŭtentikaj manuskriptoj, fotoj, personaj posedaĵoj de bulgaraj verkistoj, poetoj kaj kritikistoj, prezentitaj unufoje antaŭ vasta publiko, estis ankau tagkajero de Penjo Penev, skribita Esperante kaj bulgaringve en Dobromirka en 1948.

En la tagkajero la poeto anoncas pri sia versaĵo titolita esperantlingve — „Homo“.

Iliana ILIEVA

„NEUES DEUTSCHLAND“ ANONCAS

La 6-an de aŭgusto, en la salono de katalogoj ĉe la Urba Biblioteko de Berlino (GDR) estis inaŭgurita ekspozicio kun 150 ekspozitaĵoj, dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto. Libro kaj gazetoj en 10 vitrinoj konigas al la vizitanto la evoluon de la Internacia Helplingvo, kies „Akto de naskiĝo“ — 40-jara broŝuro de la pola oftalmologo d-ro Zamenhof, portas la daton 26-a de julio 1877.

Per informtabulo la vizitanto ekscias interalie, ke hodiaŭ Esperanto estas uzata en pli ol 100 landoj, ke en la mondo ekzistas 70 naciaj kaj 40 internaciaj organizoj kaj ke la aperantaj gazetoj atingas la nombron 100. La lingvo estas prezentita kiel rimedo de interpopola interkompreniĝo, de kulturo, de paco kaj progreso. Pluraj fakoj de la ekspozicio atestas pri la uzo de Esperanto en la scienco, tekniko, kaj kulturo kaj pri la tradicia laborista Esperanto-movado.

Kiril Drajev

In memoriam

FORPASI PROF.D-RO SZERDAHELYI

El frata Hungario venis subite koroskua, nigra novaĵo: forpasis en sia 63-jara aĝo prof. d-ro István Szerdahelyi, (Serdahelj) — estro de la Esperanto-fako en Universitato de Budapeŝto, vic-prezidanto de HEA, prezidanto de ILEI, akademiano de Esperanto, Honora membro de UEA. En lia personeco la Esperanto-kampo perdis unu el siaj plej eminentaj plugistoj.

Prof. d-ro Szerdahelyi estis elstara interlingvist-esperantologo, fama Esperanto-pedagogo kaj metodikisto. Al lia plumo apartenas bonegaj Esperanto-lerniloj: lernolibroj (por hungaraj kaj internacia) impona libro pri metodologio de Esperanto-instruado k.a., dekoj da artikoloj. Li estis ege ŝatata kursgvidanto dum seminarioj, interesa preleganto en konferencoj kaj centoj da kunvenoj. Sed multo restis ankoraŭ neskribita, nedirita! Ĉar li estis vere neelĉerpebla fonto de scioj kaj saĝo!

István Szerdahelyi estas vaste konata inter la bulgaraj esperantistoj. Invitite de la Instruista Sekcio de BEA li kelkfoje partoprenis en niaj someraj internaciaj kursoj kiel instruisto en la plej supera grado — por instrurajtoj. Tie li gvidis ĉiam la metodikajn lecionojn (teorion kaj praktikon). Kaj multfoje li esprimis sian bedaŭron, ke li ne povas veni pli ofte al ni pro siaj granda okupateco kaj nesufiĉe firma sano. . .

Genuflekson memore al la forpasinto!

BEA

Estimataj legantoj,

La praktiko pravas, ke BEA jam havas propran sperton pri la organizado de internaciaj junularaj laborbrigadoj. En la lasta numero de „BE“ ni rakontis al vi pri la laborbrigado en Karlovo. Nun ni proponas al vi informojn pri du jam tradiciaj internaciaj laborbrigadoj. Niaj kunlaborantinoj M. Elenova kaj N. Krásteva provis priskribi tiujn junularajn arangojn strebante gardi la dokumentecon. Tiudirekte pleje helpis la fotoaparato de Georgi Ličev, dank' al kiu ni havas fotoreportajon de Vrabovo.

„BE“.

JAM POR DUA FOJO

Ci-somere vilaĝo Sădievo, distrikto de Burgas denove gastame akceptis junajn brigadanojn-esperantistojn. De la 7-a ĝis la 27-a de aŭgusto j. k. 83 personoj el Bulgario, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio kaj Hispanio (Katalunio) rikoltis persikojn kaj pomojn.

Tiu internacia E-laborbrigado por dua fojo estis organizita de Bulgara Esperanta Junularo, DE de BEA — Burgas, kaj la E-societo en Ajtos. La stabo konsistis el tri virinoj: brigadestro — Elena Stojkova, vicbrigadestro kaj respondeculo pri laborproceso — Elena Balevska, respondeculo pri kultura agado — Minka Stojanova. La agrabla etoso dum la solena fermo, kiun mi partoprenis, parolis pri la belaj tagoj, pasigitaj kune. Sed pli bone mi lasu la partoprenintojn mem rakonti.

Ljubiša PRERADOVIĆ (Jugoslavio):

— Ĉi-tie mi sentis min tre bone, ĉar oni kreis grandan amikecon inter la reprezentantoj de la diversaj nacioj. Krome la partoprenantoj povis lerni Esperanton. Mi bedaŭras, ke la laborbrigado jam finiĝis. Mi ŝatus, ke ĝi daŭrus pli longe, almenaŭ unu monaton. La laboro estis agrabla kaj entute la vivo ĉi-tie.

János ZURAWIECKI (Pollando):

— Mi admiras la laborbrigadon entute. Konkrete mi estas tre kontenta pro la bonaj logikonatoj. La estrino estas tre simpatiaj kiel homoj kaj bonaj kiel organizantoj. Nur mi opinias, ke estos pli bone, se la homoj estu organizataj en pli malgrandaj grupoj kaj en ĉiu estu reprezentantoj de ĉiu nacio — por realigo de pli facilaj internaciaj kontaktoj. Finfine mi diros, ke multe da ĝejnuloj el Pollando venontjare ŝatus partopreni la laborbrigadon, ĉar la etoso estis eksterordinare bona kaj la homoj sentis sin ĉi-tie kiel en unu familio.

Kaj nun ni aŭdu la opinion de la ĉefbrigadestro Elena STOJKOVA:

Por dua fojo mi goidas la laborbrigadon en Sădievo. Kiel pasintjare, ankaŭ nun la rezultoj ĝenerale estas bonaj. Sed malfacile estis por ni okazigi kelkajn arangojn pro la nesufiĉe bona kono de Esperanto fare de iuj brigadanoj — diference de la pasinta jaro, kiam absolute ĉiuj parolis bone la lingvon. Estus pli bone, se la laborbrigado partoprenos reprezentantoj de pli multaj landoj. Tiam oni povus organizi pli da interesaj arangoj. Plej bone laboris la grupoj el Pollando kaj Ĉeĥoslovakio, ankaŭ ĉiuj ceteraj partoprenantoj laboris laŭ siaj fortoj.

En la nomo de la Estraro de BEJ mi kore dankas al la laborbrigadaj gvidantoj kaj al ĉiuj partoprenintoj pro ilia laboro kaj int esprimas nian fortan esperon ke tiu laborbrigado larigos tradiciaj, vera E-nestoj!

Mariana ELENOVA,
prezidanto de BEJ



VRABEVO'87

De la 3-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1987 okazis internacia junulara E-brigado en vilaĝo Vrabovo — distrikto de Loveč. Ĝi estis organizita de DE de BEA — Pleven. Partoprenis ĝeesperantistoj el Sovetunio, Pollando, Irako kaj Ekvadoro.

La junuloj laboris ĝenerale en du lokoj — ĉe la vilaĝa infangardeno kaj ĉe la arkeologiaj prifosoj en la malnova fortikaĵo de Debevo. La arkeologia laboro estis malrapida, sed ege interesa. Bonajn vortojn pri la entuziasma brigadana laboro diris la profesiaj arkeologoj Maria Cačeva kaj Ivan Zahariev. Dum la laborbrigado estis trovitaj oraj kaj kupraj moneroj de la tempo de la bulgara reĝo Ivan-Asen II, objektoj el ŝtono kaj fero, ceramikaĵoj.

Nevjana KRÁSTAVA
Foto: Georgi LIČEV